

revuo

esperanto

aŭgusto 1965

58-a jaro

n-ro 717 (8)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 141 Movado bezonas ankaŭ ideologion (Carlén)
- 142 Dudek jaroj de Unuiĝintaj Nacioj (Lapenna)
- 146 La hebrea: nia plej malnova lingvo (Broadribb)
- 148 En Israelo: moderna socio batalas kontraŭ analfabeteco (Natcom)
- 149 La mankanta vortaro (H.P.)
- 150 Personeco kaj verko de Gregor Mendel (Orel)
- 152 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado Tri kongresoj
- 153 Recenzoj
Ricevitaj eldonaĵoj
- 154 Mallongaj novaĵoj
- 155 Memoriga kalendaro
Esperanto en radio
Nekrologo
En la grupoj
La internacia karavano de UEA al Tokio
- 156 La Juna Vivo:
Brila Festivalo de Bulgara Esperanto-Junularo
- 158 Oficiala informilo n-ro 380
La internaciaj konkursoj 1965
- 159 Anoncetoj

kovrila bildo

"Unua legado" — vidu p. 148. (Foto: Unesko — Israela Ministrejo de Edukado)

bildojn liveris

- 148 Unesko — Israela Ministrejo de Edukado

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef. (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Teksto de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Por ke popola movado povu vivi kaj prosperi ĝi devas havi vivantan mesaĝon, kiu kapablas emocii la homojn. La mesaĝo aŭ la ideologio de la movado ne nur apelu al la prudento sed ĝi devas ankaŭ apeli al la koro, al la sentoj. Nur tiam la ideologia nivelo estas tiel alta ke ĝi povas igi la homon labori kaj oferi tempon kaj monon por realigo de la ideo.

Studante popolmovadojn oni baldaŭ konstatas ke la plej potencaj popolmovadoj, ĉu religiaj, politikaj aŭ sociaj, havis relative simplan ideologion kun tre alta nivelo. Sed kun la tempo oni ofte volis modernigi la mesaĝon. Oni ne plu volis ĝistede ripetadi kaj gurdi la simplajn ideojn de la pioniroj. Sed preskaŭ senescepte la ideologia nivelo samtempe falis. La movado stagnis, ĉar ĝi ne plu havis la potencon emocii homojn al laboro kaj oferoj. La bona kaj bela organizaĵo restis same kiel la tradicioj. Sed la entuziasmo kaj kreskopovo definitive malaperis. Oni konstatis la saman fenomenon en la komerco. Entrepreno, kiu ŝanĝas sian vendigan mesaĝon pri varo, plej ofte malpliigas sian vendadon.

Ni iomete rigardu nian propran movadon, la Esperantan:

Ĉu la ideologia nivelo de Esperanto estas sufiĉe alta? Ĉu ni prezentas nian ideologion tiel ke ĝi havas la sufiĉan altecon ĉe homoj? Jen demandoj, kiuj estas ege gravaj! Alia grava demando: Ĉu nia sinteno aŭ mesaĝo dum la lastaj jaroj malaltigis la ideologian nivelon ĉe la homoj?

Lingvo estas socia sinteno esprimi pensojn kaj tiel komprenigi ilin. Estas al mi tute klare ke la strebado enkonduki novan lingvon en si mem havas sufiĉe malaltan ideologian nivelon. Ĝi estas komparebla al strebado enkonduki novan stenografion aŭ novajn regulojn en la trafiko. Ne multaj homoj volas oferi laboron kaj tempon nur por tia ideo, se ĝi ne donas ekonomian rekompencan.

Kaj tamen ni vidis homojn, kiuj oferis multe por progresigi Esperanton. Ili vere havis entuziasmon kaj oferejon. Kelkaj eĉ suferis malliberon, jes, donis sian vivon. Por ili Esperanto sendube havis treege altan ideologian nivelon. Ilia pensado vere estas studinda. Zamenhof mem estis tia homo. Oni tuj povas konstati, ke ili ligis al la mondlingva ideo aliajn konceptojn, kiuj kreis ilian entuziasmon, oferejon kaj laborejon. Estis ideoj pri popola interfratiĝo, internacia kunlaboro, pri paco, kultura kaj rasa justeco, estimo al homoj sen konsidero pri raso, kulturo, lingvo, religio kaj politikaj opinioj. Tio estas sufiĉe alta ideologia nivelo por progresigi movadon, ĉar ĝi celas fari pli bonan mondon. Tion oni ankaŭ nomis la "interna ideo" de Esperanto.

Vere estas ke, precipe dum jardekoj pa-

sintaj, ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas sektecaj, troidealistaj esperantistoj, kiuj troigas la ideojn de Zamenhof kaj prezentas ilin en ofte stranga kaj ridinda maniero. Por ili Esperanto fariĝis kvazaŭ religio. Ili aperas kun multaj verdaj steloj aŭ tro granda, kun flagoj kaj ĉiama propagando, kiu pleje faris malan efikon. Krom tio ili ankaŭ ofte per siaj vestoj, konduto kaj sinteno aperas kiel veraj stranguloj. Sendube tiaj esperantistoj en sia troa kaj stranga "samideaneco" malutilis al la movado, kvankam oni ne povas nei ke ili ardas de entuziasmo kaj ke Esperanto havas la plej altan ideologian nivelon por ili.

Oni povas kompreni, ke multaj prudentaj esperantistoj reagis kontraŭ tia misprezento de Esperanto fare de tiuj stranguloj. Sed ofte ili reagis en maniero, kiu ankoraŭ pli multe povas malutili al la movado ol povas fari fanatikaj stranguloj. Ĉar ofte la reago inter prudentaj sobraj esperantistoj estas jena:

"Ni ne parolu pri "interna ideo", pri paco kaj fratiĝo inter popoloj. Ni estu praktikaj homoj! Ni prezentu Esperanton nur kiel praktikan ilon por sciencistoj, turistoj, komercistoj k.t.p. Ni forigu ĉiajn sentimentalajn erojn el nia informado eĉ inter ni mem. Ni prefere forigu ankaŭ ĉiujn flagojn kaj insignojn same kiel la kantadon de la himno. Ni estu praktikaj kaj realistaj. Ni ne simulu al tiuj sektecaj fanatikaj stranguloj. Tiam ni finfine sukcesos venkigi Esperanton."


Ni devas lerni el la historio

Kvankam mi bone povas kompreni tiun reagon, mi tamen devas atentigi ke la citita rezonado nepre malaltigas la ideologian nivelon ĉe la esperantistoj. La rezulto estos malpli da entuziasmo, malpli da oferoj kaj laboro por la afero. La movado stagnos kaj velkos. Ni nepre devas lerni el la historio de aliaj popolmovadoj.

Ĉu ne ekzistas la eblo vivteni la altajn idealojn de internacia amikeco, sed prezenti ilin en bona kaj prudenta maniero? Certe tiu eblo ekzistas. Tiurilate ni studu Zamenhof mem. En la kluboj ni nepre vartu, kreskigu kaj kulturu liajn malnovajn idealojn. Ni vivtenu nian ideologian nivelon, alie ni mortigos la movadon. Sed sana kulturado de la idealoj neprigas ke oni forigu la malsanecajn simptomojn, kiuj povas aperi ĉe strangaj, fanatikaj kaj sektecaj homoj. Tio estas afero de kulturista purigado kaj edukado. Sed en tiu laborado ni ne forgesu, ke multa uzado de la lingvo ĉe la individuo naskas amon al la lingvo kaj al la kulturo, kiun ĝi reprezentas. Praktike ĝi havas la saman efikon kiel altigo de la ideologia nivelo.

Erik Carlén

esperanto
aŭgusto 1965



Sur la sekvantaj paĝoj aperas la koncizigita teksto de speciala prelego de la Internacia Somera Universitato, 18-a sesio, voĉlegita en Tokio Mardon, la 3-an de aŭgusto 1965, okaze de la 20-a datreveno de la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj.

La aŭtoro — la prezidanto de UEA — estas iama profesoro de publika internacia juro en la Universitato de Zagreb, nun docento pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en la Universitato de Londono.

La sekvanta teksto povas tre taŭge formi la bazon de specialaj prelegoj kaj paroladoj en lokaj societoj kaj apartaj kunvenoj okaze de la Tago de U.N., la 24-an de oktobro.

I. ENKONDUKO

La 1-an de septembro 1939 Hitler atakis Pollandon kaj tiel provokis la Duan Mondmiliton, la plej sangon kaj la plej kruelan iam spertitan de la homaro. Al la aro da malsukcesoj de la Ligo de Nacioj aldoniĝis la mortiga bato. La sama tago, kiu signifis nenigon de la ĝistiamma monda politika strukturo, tamen jam entenis la ĝermojn de pozitiva konstruado direktita al kreo de nova organizaĵo, pli vasta, pli universala kaj pli fortika ol la forpasinta.

La vojo estis nek glata, nek simpla. Se en la komenco ĝin markis defendo de sia propra nuda vivo kaj rajto je ekzisto kontraŭ la sklaviga agreso, baldaŭ estis trovita komuna bazo por iom-post-ioma konstruado de la nova mondo. La unua grava dokumento estis la Londona Deklaracio de la 12-a junio 1941, en kiu la aliancanoj, inkluzive la rifuĝintajn registarojn en Londono de la landoj okupitaj de la nazioj, deklaris sin kontraŭ separa paco. En la dokumento estis ankaŭ dirite: "La sola reala bazo de daŭra paco estas la libervola kunlaborado de liberaj popoloj en mondo en kiu ĉiuj, liberigitaj de la minaco de agreso, povos ĝui ekonomian kaj socian sekurecon; estas nia intenco labori kune, kaj kun aliaj liberaj popoloj, kaj en milito kaj en paco, por atingi tiun celon."

Kvar pluj plenaj jaroj da sangado kaj da espero devis pasi inter la Londona Deklaracio kaj San Francisco. Unu dokumento viciĝis post la alia: la Atlantika Ĉarto de aŭgusto 1941, la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj — konvena nomo trovita de Roosevelt — de la 1-a de januaro 1942, la Moskva Deklaracio de la 30-a de oktobro 1943, la Teherana Deklaracio de la 1-a de decembro 1943, la Projekto de la Ĉarto ellaborita de la Konferenco en

Dumbarton Oaks en 1944, la principoj de voĉdonado en la Konsilo de Sekureco interkonsentitaj en februaro 1945. Ilin karakterizas kuraĝo en la unuaj periodoj de defendo kaj retiriĝoj sur la batalkampoj, kaj firmeco en la lastaj fazoj, kiuj proksimigis la momenton de la venko.

Kvindek ŝtatoj estis reprezentitaj ĉe la Konferenco de San Francisco. Dum naŭ semajnoj, de la 25-a de aprilo ĝis la 26-a de junio 1945, la Konferenco intense diskutis politikajn kaj jurajn problemojn surbaze de la Projekto akceptita en Dumbarton Oaks kaj la decidoj de Jalta. Multaj amendoj estis prezentitaj kaj pluraj ŝanĝoj faritaj. Fine naskiĝis la Ĉarto de la nova mondorganizaĵo. La 50 partoprenintaj ŝtatoj kaj Pollando, kiu ne povis reprezentiĝi, ĉar en tiu tempo ĝi ankoraŭ ne havis ĝenerale rekonitan registaron, estas konsiderataj kiel Membroj-Fondintoj de UN.

En la lastaj 20 jaroj multaj pliaj ŝtatoj estis akceptitaj kiel membroj de UN. Efektive nuntempe entute 114 ŝtatoj, praktike preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo, estas ĝiaj membroj. Tio donas al la nova organizaĵo multe pli universalan karakteron ol iam havis la Ligo de Nacioj. Pro specialaj kaŭzoj nur kelkaj ŝtatoj troviĝas ekster ĝiaj vicoj. La demando de Cinujo fakte ne estas demando de membreco, sed de jura reprezentado de tiu ŝtato en UN.

Aparta proceduro estas antaŭvidita por ŝanĝi la Ĉarton. Ĝi povas esti amendita de la Ĝenerala Asembleo aŭ aparta Ĝenerala Konferenco de ĉiuj Ŝtatoj-Membroj. Por la valideco de la amendoj estas necesa plimulto de 2/3-noj aŭ en la Ĝenerala Asembleo aŭ en la Ĝenerala Konferenco. Tiel akceptitaj amendoj ekvalidas, kiam ilin ratifas du trionoj de ĉiuj membroj, inkluzive la konstantajn membrojn de la Konsilo de Sekureco. En 1963 la Ĝenerala Asembleo amendis la artikolojn 23, 27 kaj 61 de la Ĉarto. Tiuj amendoj koncernas la altigon de la nombro de la membroj de la Konsilo de Sekureco kaj de la Ekonomia kaj Socia Konsilo, kiel ankaŭ la necesajn ŝanĝojn, rezulte de tiu altigo, rilate la voĉdonadon en la Konsilo de Sekureco pri la t.n. proceduraj aferoj. Ĝis la 31-a de marto de tiu ĉi jaro entute nur 63 ŝtatoj-membroj, inkluzive unu konstantan membron de la Konsilo de Sekureco, deponis siajn ratifajn instrumentojn, kio signifas ke la koncernaj amendoj ankoraŭ ne ricevis juran forton.

II. ĈEFAJ ORGANOJ

Por plenumi siajn multnombrajn taskojn, la Organizaĵo havas apartajn organojn. En la Ĉarto estas menciitaj kiel la ĉefaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj: Ĝenerala Asembleo, Konsilo de Sekureco, Ekonomia kaj Socia Konsilo,

UNUIĜINTAJ NACIOJ

Internacia Kunlaboro)

Kuratora Konsilo, Internacia Kortumo kaj Ĝenerala Sekretario.

La funkcioj kaj kompetentecoj de tiuj organoj estas precize difinitaj. Ĉiu el ili devas plenumi iun taskon, kiu respondas al la fundamentaj celoj de Unuiĝintaj Nacioj. Tiuj celoj ne rilatas nur al sekureco kaj paco, sed ankaŭ al ekonomiaj problemoj, solvado de konfliktoj per juraj metodoj, kunlaborado sur plej diversaj kampoj.

Esenca diferenco disde Ligo de Nacioj

El organiza vidpunkto la organoj de Unuiĝintaj Nacioj estas tiel ligitaj inter si, ke ili fakte prezentas nur partojn de unueca tuto kun unuecaj komunaj celoj. Tiel oni volis atingi, ke ĉiu organo centrigu siajn atenton kaj laboron al tiu kampo, kiun fiksis por ĝi la Ĉarto, kio, siavice, devus progresigi ankaŭ la komunajn celojn de la tuta Organizaĵo.

Tia organiza strukturo esence diferencas de la organiza formo de la Ligo de Nacioj. Ĝi havis nur Asembleon kaj Konsilon, al kiu estis aldonita la Konstanta Sekretariato. La linio inter la kompetenteco de la Asembleo kaj tiu de la Konsilo ne estis sufiĉe klare markita, kio ofte kreis konfuzon, superfluaĵojn prokrastojn kaj transĵetadon de la respondecado de unu el tiuj du organoj sur la alian.

Krom la ĉefaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj, oni povas formi ankaŭ helpajn organojn, se por tio montriĝas bezono.

La Ĉarto preskribas, ke la ĉefaj kaj helpaj organoj de UN estas egale alireblaj por viroj kaj por virinoj. Tio, cetere, estas konforma al la fundamentaj principoj de la Organizaĵo.

Unuiĝintaj Nacioj ricevas helpon ankaŭ de flankaj organismoj, kiuj ne povas esti konsiderataj kiel veraj ĝiaj organoj. Temas pri la t.n. specialigitaj organizaĵoj, kies rilatoj kun UN estas reguligitaj per apartaj kontraktoj inter tiuj organizaĵoj kaj UN pere de la Ĝenerala Asembleo. Al tiaj organizaĵoj apartenas ekzemple Internacia Labor-Organizaĵo (ILO), Organizaĵo de UN por Nutraĵo kaj Agrikulturo, UNESKO, Monda Organizaĵo por la Sano, Universala Poŝta Unio, Internacia Telekomunika Unio, Monda Meteologia Organizaĵo kaj pluraj aliaj.

Laŭ sia karaktero, la Konsilo de Sekureco kaj la Ĝenerala Asembleo estas politikaj organoj; la Ekonomia kaj Socia Konsilo, la Kuratora Konsilo kaj la Sekretariato estas ĉefe teknikaj organoj; la Internacia Kortumo estas jura-juĝa organo.

Oni ne povas diri, ke ĉiuj ĉefaj organoj havas la saman gravecon. La Ĝenerala Asembleo havas la plej larĝan kompetentecon, kaj ĉiuj aliaj organoj devas raportoj al ĝi, sed la Konsilo de Sekureco havas la plej gravajn

taskojn kaj nur ĝi povas apliki devigajn rimedojn, eĉ la uzon de militaj fortoj. La Ekonomia kaj Socia Konsilo kaj precipe la Kuratora Konsilo solvas sendube tre gravajn problemojn, sed ilia agado estas subigita al la postuloj de la Ĝenerala Asembleo kaj ankaŭ al tiuj de la Konsilo de Sekureco. La Internacia Kortumo havas tute apartan, memstaran pozicion kiel sendependa juĝa organo.

La graveco de la organoj manifestiĝas ankaŭ en la karaktero de iliaj konkludoj. El pure jura vidpunkto la plej grandan forton havas la juĝoj de la Internacia Kortumo. La Ĝenerala Asembleo nur malmulte decidas, sed pli multe povas rekomendi. Konsiderante la fakton, ke laŭ la jura strukturo de la Ĉarto nur la veraj decidoj estas devigaj por la ŝtatoj, dum la rekomendoj, kiel diras la vorto mem, estas deziresprimoj kun akcentita nuanco de premo, sed tamen jure nedevigaj, oni povus kredi, ke la konkludoj de la Ĝenerala Asembleo havas malgrandan valoron, kiam temas pri rekomendoj. Efektive, pro la fakto, ke en la Ĝenerala Asembleo estas reprezentitaj ĉiuj ŝtatoj kaj ke la nombro de tiuj ŝtatoj preskaŭ egalas al la nombro de ĉiuj nun ekzistantaj ŝtatoj en la mondo, la rekomendoj de la Ĝenerala Asembleo havas grandegan moralan forton. En la kazoj, kiam la ĉiuvoĉaj rekomendoj havas deklaran karakteron, oni povas konsideri ilin kiel plej fortan pruvon pri ekzisto de t.n. kutima juro reguliganta la koncernan sferon precize laŭ la enhavo de tia deklara dokumento. Tia karaktero, ekzemple, havas la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, aŭ la Deklaracio pri la Forigo de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio, aŭ la Deklaracio pri la Juraj Principoj por la Uzo de la Kosma Spaco por Pacaj Celoj, kiuj estis akceptitaj unuanime. La Konsilo de Sekureco havas la plej grandan decidpovon, precipe en la plej gravaj demandoj: konservo aŭ restarigo de la paco. La du aliaj Konsiloj povas diskutadi, studadi la problemojn kaj faradi rekomendojn ĉu al la Ĝenerala Asembleo, ĉu al la Konsilo de Sekureco, aŭ al la membroj mem de la organizaĵo. Sed tiuj du organoj ne povas decidadi kaj tial la jura forto de iliaj konkludoj ne estas tre granda.

III. ASPEKTOJ DE LABORO

Estas absolute maleble prezenti eĉ nur la plej esencajn trajtojn de ĉiuj multnombraj flankoj de la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Tial mi limigos min al nura vicigo de la ĉefaj agadoj, kio eble donos almenaŭ palan bildon pri la amplekso de demandoj, pri kiuj okupiĝas Unuiĝintaj Nacioj, kaj pri la problemoj kiujn ĝi frontas.

La ĉefa kampo de agado estas tiu de sekureco kaj politikaj demandoj. Sur tiu ĉi kampo



Prof. d-ro
Ivo Lapenna

La ampleksa kaj multeflanka laboro de U.N.

unu el la gravaj problemoj, al kiu UN dediĉis grandan atenton, sed kiu bedaŭrinde ankoraŭ ne estas solvita, estas tiu de senarmiĝo kaj aro da konektitaj demandoj. UN diskutis en pluraj okazoj la danĝerojn de la testado de nukleaj armiloj kaj klopodis atingi interkonsenton pri malpermeso de tiaj testoj. Rezulte de tiuj diskutoj, kaj ankaŭ sub la premo de la publika opinio de la mondo, la du grandaj nukleaj potencoj subskribis la konatan interkonsenton pri malpermeso de la testoj en la atmosfero kaj surtere. En ligo kun la grandaj teknikaj atingoj en la kosma spaco, apartaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj okupiĝis pri la demando de la uzo de la kosma spaco ekskluzive por pacaĵoj. Pri tiu demando plurfoje okupiĝis la Ĝenerala Asembleo, aparta Komitato pri Sciencaj kaj Teknikaj Aspektoj, alia Subkomitato pri Juraj Aspektoj, kaj la ĝisnuna rezulto estis la menciita Deklaracio pri la juraj principoj regantaj la uzon de la kosma spaco por pacaĵoj. Plue, UN pritraktis la efikon de atoma radiado, la uzon de atoma energio por pacaĵoj, la metodojn por malgrandigi internaciajn tensiojn kaj fortikigi la pacon kaj amikecon inter la popoloj, aron da demandoj rilatantaj al Meza Oriento, al Azio kaj Malproksima Oriento, al Afriko kaj Eŭropo. Fortoj de Unuiĝintaj Nacioj estis uzitaj en kelkaj kazoj por helpi la ĉesigon de malamikaĵoj kaj reestabli la pacon.

La Jaro de Internacia Kunlaboro

El ĉiuj ĉi politikaj demandoj apartan atenton meritas la decidoj kontraŭ la propagando de milito kaj la proklamo de 1965 Jaro de Internacia Kunlaboro. La Ĝenerala Asembleo, per sia Rezolucio de la 20-a de decembro 1962, alvokis ĉiujn ŝtatojn-membrojn, ĉiujn registarajn kaj neregistarajn organizaĵojn intensigi ĝis maksimumo, laŭ siaj eblecoj, la agadon favore al internacia kunlaborado de la popoloj. Kiel konate, Universala Esperanto-Asocio akceptis la inviton kaj aktive partoprenas en tiu mondskala agado laŭ speciala Laborplano aprobita de la Komitato dum la Kongreso en Hago.

Sur ekonomia kampo Unuiĝintaj Nacioj, interalie, pritraktis kaj ofte faris gravajn decidojn pri jenaj demandoj: mondaj ekonomiaj kondiĉoj kaj evolutendencoj; internacia kunlaborado kun la celo atingi pli efikan ekonomian evoluon; ekonomiaj kaj sociaj sekvoj de senarmiĝo; manko de nutraĵoj, malsato kaj monda programo de nutrado; regionaj ekonomiaj komisionoj; programo de helpo al evoluantaj nacioj ktp.

En la sfero de sociaj, humanecaj kaj kulturaj problemoj la Organizaĵo montris aparte grandan aktivecon. Ĝi pritraktis, interalie, la sociajn aspektojn de industriigo; problemojn,

kiujn frontas la familio, la junularo kaj la infanoj en la hodiaŭa rapide evoluanta mondo; preventon de krimo kaj traktadon de krimuloj kun aparta konsidero de la krimeco inter la junularo; migradon, domkonstruadon kaj planadon; problemojn kiujn kaŭzas la rapide kreskanta nombro de la loĝantaro kaj multajn aliajn. La rimarkindaj atingoj de UN rilate la homajn rajtojn estas tiel vaste konataj, ke apenaŭ necesas menci ilin en tiu ĉi kunteksto. Ne temas nur pri la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, sed ankaŭ pri la laboro rilate la rajton de la popoloj decidi mem pri sia sorto, pri la forigo de diskriminacio kaj protekto de minoritatoj, pri la deklaracio koncerne la rajtojn de la infano kaj la prevento kaj puno de la krimo de genocido.

Deklaracio pri koloniaj landoj

Kontentigaj sukcesoj estas atingitaj en la sfero de kuratoreco. La 14-an de decembro 1960 la Ĝenerala Asembleo proklamis la neceson fini kiel eble plej baldaŭ koloniismon en ĉiuj ĝiaj formoj kaj manifestiĝoj. Ĝi akceptis Deklaracion pri sendependiĝo de koloniaj landoj kaj popoloj. Laŭ la Deklaracio, la subigo de popoloj al fremda regado kaj ekspluatado konsistigas neadon de fundamentaj homaj rajtoj, estas kontraŭa al la Ĉarto kaj obstaklas la firmigon de la monda paco kaj kunlaborado. Kiel konate, multaj landoj, kiuj nur antaŭ kelkaj jaroj estis en pli aŭ malpli alta grado dependaj, fariĝis suverenaj ŝtatoj. En la tuta mondo troviĝas nun sole kelkaj dolorigaj restaĵoj de la malnova koloniismo.

Unu el la kondiĉoj por paca kunvivado de la ŝtatoj kaj efika kunlaborado de la nacioj estas establo de monda jura ordo, deviga por ĉiuj. En tiu ĉi sfero du grupoj de agadoj meritas atenton: la aktiveco de la Internacia Kortumo kaj la klopodoj evoluigi kaj kodigi la internacian juron.

Kvankam la kompetenteco de la Internacia Kortumo ne estas deviga por la ŝtatoj, ĉar ĉi tio, kio nomiĝas deviga kompetenteco, estas efektive libervole kaj anticipe akceptita kompetenteco de la Kortumo, tamen la Kortumo sukcese solvis plurajn gravajn kazojn. La unua estis la fama kazo konata sub la nomo de Korfua Kanalo inter Britujo kaj Albanujo, en kiu la preleganto havis la honoron funkcii kiel advokato-konsilisto. Sekvis tuta aro da aliaj, el kiuj speciale gravaj estis la t.n. Angla-Norvega kazo pri Fiŝkaptejoj; la kazo koncerne la protekton de francaj civitanoj kaj protektataj personoj en Egiptujo (solvita ekster la Kortumo); la Kolombia-Perua kazo pri azilo; la kazo koncerne la rajtojn de usonaj civitanoj en Maroko; la tre grava kazo de la Angla-Irana Naftokompanio; la kazo Nottebohm; la kazo rilate la rajton pasi tra hinda teritorio kaj pluraj aliaj. Krome, la Kortumo donis tutan aron da konsultaj opinioj, el kiuj la plej menciindaj estas tiu pri la rezervoj al la Konvencio pri genocido kaj tiu pri la financaj sindevigoj de la membroj

al Unuiĝintaj Nacioj.

Al alia grupo de agadoj de Unuiĝintaj Nacioj apartenas la klopodoj progresigi kaj kodigi internacian juron. Grandan laboron plenumis la Internacia Jura Komisiono, kreita kaj funkcia en la sino de UN. Ankaŭ la subkomitato pri la Juraj Aspektoj de la Uzo de la Kosma Spaco por Pacaj Celoj faris utilan laboron. Menciindaj estas la du ĝenevaj konferencoj pri mara juro kaj la Viena Konferenco pri diplomatiaj imunecoj kaj privilegioj. Rezulto de tiuj agadoj estis pluraj konvencioj. Jen nur kelkaj el ili: Konvencio pri la Teritoria Maro kaj la Apuda Zono; Konvencio pri la Aperta Maro; Konvencio pri Fiŝkaptado kaj Konservado de Vivantaj Rimedoj de la Aperta Maro; Konvencio pri la Kontinenta Breto; Konvencio pri la Konsulaj Rilatoj; Konvencio pri la Diplomatiaj Rilatoj ktp.

Ĉio ĉi montras la vastecon, amplekson kaj multflankecon de la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Kaj oni ne devas forgesi, ke la supraj agadoj estas nur supraĵe menciitaj kaj ke, krom ili, Unuiĝintaj Nacioj aktivis ankaŭ en sennombraj aliaj direktoj.

IV. KONKLUDO

Unu el la ĉefaj antagonismoj de la hodiaŭa mondo, el kiu fontas la granda plimulto de niaj malfacilaĵoj, estas la fakto, ke ni subite troviĝis en la mezo de la dua duono de la dudeka jarcento el teknika vidpunkto, dum samtempe ni plue vivas en ŝtataj formoj de la 19-a jarcento kaj pensas sub la influo de politikaj konceptoj de tiu forpasinta epoko. Ne ĉiuj el ni, eble, sed certe la politikaj gvidantoj de la mondo. Unuflanke satelitoj — pli ol kvarcento da ili en la nuna momento — orbitas nian terglobon multfoje ĉiutage kaj aliaj raketoj alluniĝas aŭ fuĝas en la senfina kosma spaco, sed aliflanke ni plue vivas en limigitaj ŝtatuoj kaj estas plue obsedataj de antikviĝintaj konceptoj. Estas certe, ke la tuta teknika progreso kaj la avantaĝoj kiujn ĝi prezentas por la homaro jam hodiaŭ kaj kiujn ĝi ankoraŭ pli abunde prezentos en la baldaŭa estonteco, puŝas la mondon al pli granda unuiĝo kaj integriĝo. La novaj generacioj devos rapide adaptiĝi al tiuj ŝanĝitaj cirkonstancoj. Komuna neŭtrala lingvo helpas ilin en tiu direkto, kaj samtempe ĝi mem akiros rapide novajn poziciojn paralele kun la ŝanĝita pensmaniero. Intertempe, Unuiĝintaj Nacioj plenumas la transiran taskon de renkontiĝejo kaj centro por harmoniigo de aspiroj, ofte kontraŭaj, de klopodoj, ne malofte samdirektaj.

Kompreneble, estus danĝere kaj malsaĝe ne vidi la realaĵon en ĝia tuteco, kune kun ĉiuj ĝiaj pozitivaj kaj negativaj aspektoj. Se je la pozitiva flanko sendube troviĝas ĉiam pli akcentitaj tendencoj al universaleco, aliflanke oni ne devas forgesi la diversajn kontraŭaĵojn, el kiuj almenaŭ tri havas eksplodan karakteron.

La eksplodaj fortoj estas la klasa divido, la ideologia divido kaj la divido laŭ la koloro.

Ili prezentas la tri ĉefajn danĝerojn en la nuntempa mondo.

Parolante pri klasa divido mi ne pensas tiel multe al la divido inter riĉaj kaj malriĉaj individuoj en la sino de la sama socio, sed multe pli al la divido inter riĉaj kaj malriĉaj ŝtatoj. Al la riĉaj ŝtatoj apartenas tiuj, en kiuj la tuto de la nacia enspezo estas inter 250 kaj 700 britaj pundoj jare por ĉiu persono; al la malriĉaj apartenas tiuj, en kiuj la jara enspezo de unuopa persono estas inter 19 kaj 25 pundoj. Generale parolante, la riĉaj nacioj apartenas al la nordaj regionoj; la malriĉaj al la sudo. Tiu divido transpasas la ideologian dividon ĝis tiu grado, ke kelkfoje eĉ ideologiaj disputoj estas nura masko por kovri diferencojn en riĉeco.

La ideologia divido de la mondo, kvankam malpli forta ol antaŭ kelkaj jaroj, tamen ekzistas kaj manifestiĝas en diversaj formoj.

Fine, la divido laŭ la koloro, kiu ofte koincidas kun tiu laŭ la riĉeco, estas plue brulanta problemoj kiu, malgraŭ diversaj deklaroj kaj objektivaj progresoj, tamen plue prezentas eksplodan punkton.

Ne temas, do, nur pri tio, kion ĝis antaŭ nelonge oni povis nomi, kondiĉe kaj kun rezervoj, antagonismo Oriento-Okcidento, sed pri multe pli kompleksa reto da kontraŭaĵoj, el kiuj eble tiu inter Nordo kaj Sudo estas la plej grava kaj tial plej urĝe solvenda.


En tiaj kondiĉoj elstaras la rolo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu, malgraŭ la mankoj kaj difektoj, tamen jam faris multon precipe sur la kampo de ekonomia kunlaborado. Mi akcentas la vorton kunlaborado, ĉar ne plu temas pri ia grandanima donacado fare de unuj kaj almoŝpetado fare de aliaj, sed pri kunlaborado en la vera senco de la vorto por utiligi ĝis maksimumo la naturajn riĉaĵojn de la mondo kaj la progresojn de la scienco por la bono de ĉiuj. Tio estas ankaŭ unu el la celoj de la Jaro de Internacia Kunlaboro, al kiu ankaŭ ni ĉiuj, en kiu ajn funkcio ni agas, alportu nian kontribuon.

Konservi, apogi kaj fortikigi

Estas konate, ke ĝuste nun Unuiĝintaj Nacioj frontas gravan krizon ligitan al financaj devoj de kelkaj ŝtatoj por kovri la elspezojn de ĝiaj packonservaj armitaj fortoj. Des pli grandan subtenon ĝi bezonas por venki ankaŭ tiun ĉi krizon, kiel ĝi venkis multajn aliajn. Ne malofte la esperoj rilate la eblecojn de UN perfidis, sed aliflanke estus pli ol maljuste nei ĝiajn sukcesojn. Oni devas kompreni, ke estas pli bone havi mondan organizaĵon eĉ kun organizaĵaj kaj aliaj mankoj, ol tute ne havi ĝin. Estas pli utile vivteni kaj klopodi plibonigi tion, kion oni havas, ol detrui ĉion, ĉar tiu aŭ alia aspekto ne plaĉas aŭ ne plene kontentigas. En la hodiaŭa mondo, se oni ne havus UN, oni devus krei organizaĵon, kiu certe estus tre simila al la nuna. Anstataŭ detrui por krei denove, pli racie estas konservi, apogi kaj fortikigi.

**dudek jaroj de
unuiĝintaj nacioj**

**esperanto
aŭgusto 1965**



Donald Broadribb

LA HEBREA: NIA PLEJ

La renaskiĝo

Revivigi lingvon estas ekscita afero. Revivigi lingvon kiu "mortis" antaŭ pli ol dumil jaroj estas eĉ pli ekscite. Tion oni ne ofte faras. La latina estas revivigita por uzo en la romkatolika eklezio, sed ĝi havas nur malgrandan kaj iom malcertan ekziston. Sed la hebrea estas revivigita, ne por kleruloj, nek por nur literaturo, sed por ĉiutaga vivo. En Israelo, nun, oni parolas, skribas, legas la lingvon kiu antaŭ trimil jaroj (1000 a.K.) oficialiĝis kiel la lingvo de la nove establita Israella Regno, kies monarko estis la Reĝo Saŭlo. Pro tio, la hebrea estas nia plej malnova ankoraŭ vivanta lingvo.

La hebrea influis la mondon ankaŭ alimaniere. Kompreneble ĉiu scias ke la plej granda parto de la Biblio verkiĝis en tiu lingvo. (Kelkaj partoj estis en la arama lingvo, kaj la kristana Nova Testamento en la greka.) Pro la amasa tradukado de la Biblio, preskaŭ nekalkulebla nombro da hebreisimoj eniris la lingvojn de la mondo: esprimoj, idiotismoj, proverboj, vortoj. Ni scias pri tio, kaj ne necesas nun fari liston. Sed kion ne scias la plej multaj estas la influo de la hebrea lingvo sur la strukturon de Esperanto. Ĉar la hebrea estas lingvo tre "mistera" por la plej multaj, mi deziras priskribi iomete ĝian karakteron. Zamenhof, judo, lernis kaj kapablis uzi la hebrea lingvon, kaj mem tradukis la hebrea parton de la Biblio en Esperanton, tiel donante al ni (rekte kaj nerekte) plurajn riĉaĵojn de la lingvo. Sed, anstataŭ senfrukte klopodi distingi precize kiujn elementojn li ĉerpis el kiuj fontoj, mi nur parolos ĝenerale pri la lingvo hebrea. Ĉar, verdire, oni devas finfine konkludi ke plejparte la elementojn de Esperanto Zamenhof ĉerpis ne el unu fonto sed el multaj.

Senvokala skribsistemo

Plej interesa por la eksterulo, kvankam kutima afero en la semidaj lingvoj, estas la sistemo skribi sen indiko de vokaloj. Sts kvzŭ n tt n bzns l vkljn pr lg tkstn. L lgnt pvs pst klk sprt dĉfr l skrbjn nr lgnt l knsnntjn. Kiel vi vidas, unuarigarde oni malfacile trovas la sencon, kaj neniam oni povas esti plene certa pri la celitaj vortoj. Mi ne "tradukos" la donitajn frazojn, sed lasos al vi cerbumi. Pri kelkaj vortoj eterne ekzistos malcerteco. Ekzemple, ĉu mi celis skribi la vorton "ni",

aŭ "ne", aŭ "oni" kiel la trian vorton de la unua frazo? Oni nur povas konjekti.

Kial estas ke oni ne skribas vokalojn? Por kompreni tion, ni devas ekzameni iomete la historion de la alfabeto. La alfabeto originis, probable samtempe, en Egiptujo kaj en Mesopotamio (deklaro ŝanĝota kiam aperos novaj arkeologiaj trovaĵoj) tri- aŭ kvarmil jarojn a.K. Oni tiam skribis per bildoj. Iom post iom bildo, ekzemple de ondaj linioj, ricevis specialan, propran sencon. Unue, oni eble legis ĝin "maro", "oceano", "pluvo", "akvo", kc. laŭ la bezono. Sed baldaŭ oni atribuis al la bildo nur unu vorton, "akvo". En la proto-semida lingvo tiu vorto estis "mimu". La situacio estis ne tre diferenca de la situacio en la moderna ĉina lingvo. Post kelka tempo (multaj jarcentoj!) iu geniulo reduktis la skribsistemon al nur kelkcent bildetoj, ĉar li atribuis al ĉiu bildo la unuan silabon de la koncerna vorto. Tiel ondaj linioj (ne gravas la longeco de la ondoj) ricevis la valoron "mi". Post ankoraŭ kelkaj jarcentoj, do ĉ. 1500 a.K., alia geniulo — aŭ, miaopinie, ne unu persono sed normala evoluo — pli simpligis la sistemon, forlasante la vokalon de la silabo kaj uzante la bildeton por la unua sono de la vorto, ĉikaze *m*. Se vi mallongigos la ondojn, kaj skribos nur la plejsupran ondon, vi facile trovos nian literon *m*.

Pro hazardo, la elektitaj silaboj inkludis nur konsonantojn, en tiu formo de la alfabeto kiu populariĝis en Palestino. En lingvo parenca al la hebrea, la ugarita lingvo, oni kelkfoje skribis vokalojn, sed plejofte ne. Ĉar, unue, skribo estis tasko nur de kleraj profesiuloj, ne sentiĝis bezono plisimpligi la sistemon. Tiel establiĝis la kutimo ankoraŭ konservata, skribi nur konsonantojn en la hebrea lingvo. (Tio estas ĝeneralaĵo, kiun kiel teknikisto mi devus modifi kelkrilate. Sed mi ne mencias la detalojn ĉi tie.)

Se vi bonvolos provi skribi vian nacian lingvon ĉimaniere, mi suspektas ke via rezulto estos malpli favora ol la rezulto kiun mi montris en Esperanto. T.e., vi probable povis "diveni" sen tro granda ĝeno la sencon de miaj konsonantaj frazoj esperantaj, sed viaj nacilingvaj vortoj suferos pli. Kial?

Ĉar Esperanto havas faktoron komunan kun la hebrea: ke la gramatikaj rilatoj plejparte montriĝas per vokaloj, sed la elementoj de la vortradikoj estas plejparte konsonantoj. Tiel, *libr* povas esti *libro*, *libra*, *libera*, *libere*, *libero*, eĉ *liberi*, do sep eblaj vortoj. Sed nur du radikoj. La semidaj lingvoj havas la "stran-

MALNOVA LINGVO

LA ETNAJ LINGVOJ EN KOMPARO KUN LA INTERNACIA

2: la hebrea

gan" karakteron, ke la gramatikaj rilatoj esprimiĝas pleje per vokaloj. Tiel, *spr* povas esti *skribanto*, *skribaĵo*, *skribas* (malnova senco ne plu konservata), *skribu!* kc., sed nepre iel rilatas al la senco *skrib*. Oni trovos preskaŭ neniun alian radikon kun precize sama konsonant-kombino.

La verbsistemo

Elemento tre malfacila por membroj de la hindeŭropa lingva tradicio estas la senco de la antikvaj hebreaj verboj. Tial oni radikale ŝanĝis la verbsistemon en la modern-hebrea formo de la lingvo. En la klasika lingvo, verboj ne montris tempon, nek aspekton. Oni konis du verb-formojn. Unu en la protosemida lingvo eble aspektis tiel:

lamad-ta = vi lernas

la alia tiel:

ta-lamad = vi lernas

La *ta* estis mallongigo de *anta* = *vi* (la *an* respondis al la *i* de *vi*). Se en la frazo oni volis emfazi la subjekton, oni uzis la duan formon; se la verbon, do la unuan formon. En la masora formo de la hebrea lingvo, la du verbformoj jam estis iom evoluintaj, do estis *lamadta* (la *d* prononcu kiel angla *th* en *the*) kaj *tilmad*. (Sama prononco por la *d*.) La tempon de la verbo oni devis konkludi per la ĝenerala tempo de la tuta apuda teksto. Ests kvazaŭ en Esperanto ni skribs simple *s* anstataŭ *as*, *is*, *os*, *us*.

Cio ĉi validas nur por la klasika lingvo (1000-500 a.K.). En la modernhebrea formo, oni adoptis la hindeŭropan temposistemon, tiel ke la unua formo estas preterito kaj la dua formo futuro.

Sed alia aspekto de la verbsistemo interesas nin, pro sia simileco al la Esperanto-sistemo. Tio estas la uzo de afiksoj por indiki specialajn sencojn. Se oni prenas la radikon de la specimena verbo, *lmd*, kaj afiksas *hi-* kaj *-i*-oni ricevas *hilmid* = lernigas. Se oni afiksas *ni-*, oni ricevas *nilmad* = lernigas. Se oni duobligas la centran konsonanton kaj ŝanĝas la unuan vokalon, oni ricevas *limmad* = lernadas. Pluraj aliaj tiaj modifoj ankaŭ eblas.

Ĉu vi estas ekzistencialisto? Tiu filozofia analizo estas tre populara nuntempe. Estas interese, ke oni tute ne povus diskuti la temon en la klasika hebrea lingvo, en kiu mankis la vortoj *esti* kaj *ekzisti*. (Ankaŭ tiun mankon oni solvis por la moderna formo.) Kiom vi suferus sen via ĉiutaga *esto*? Oni nepre povas disputi pri tio, sed certe ke tiu vorto ne nepre

necesa por kompreno, ĉu ne? La hebrea stranga lingvo laŭ niaj spertoj, sed ĝi tute adekvata por siaj parolantoj.

Sufiĉe pri tiaj detaloj. Kiu parolis tiun strangan lingvon? Kaj kion ni scias pri ĝia historio, antaŭ modernaj tempoj? Strange, tiuj du demandoj estas preskaŭ ne respondeblaj. El la antikva tempo, kiam la klasika lingvo estis parolata, t.e. de 1000 a.K. ĝis maksimume 200 a.K., konserviĝis nur unusola teksto, la Biblio mem! (Mi esceptas unuparagrafan ĉizajon en akvotunelo, kelkajn nur duone deĉifritajn potfragmentojn, kaj amason da moneroj.) Sed ni scias, ke la hebrea estis la lingvo de "vasta" teritorio. Nu, se ne vasta geografie, tamen vasta rilate al sia influo. Efektive, malpli ol 5000 km.² da tereno estis loĝata de hebre-parolantoj. En tiu teritorio ekzistis du sendependaj nacioj, Israelo (norda parto) kaj Judujo (suda parto). La teritorio ne estas precize sama kiel tiu de moderna Israelo.

Parencoj de la hebrea

De la parencaj lingvoj ni multon scias. Plej parencaj estas la lingvoj kaj dialektoj tre proksimaj al la hebrea regiono. El la moaba lingvo ni havas unu relative longan tekston (malgrandan paĝon da enhavo), kies dato estas nesciata sed probable ĉ. 7-800 a.K. Plej riĉe konservita por ni estas la ugarita lingvo, ĉar centojn da dokumentoj oni trovis dum ĉi tiu jarcento, el la periodo proks. 1300 a.K. Tiuj dokumentoj inkludas plurajn longajn verkojn. Ugarit estis urbeto proks. 150 kilometrojn norde de la israela bordo, kaj la tempo estis pli-malpli tiu de la Juĝistoj menciitaj en la Biblio.

Unu parenca lingvo (eble tiel parenca kiel la franca al la itala) ankoraŭ estas parolata, la araba lingvo. Sed, bedaŭrinde, skribitajn dokumentojn el la klasikhebrea periodo ni ne havas. Ankaŭ utilaj por la studanto de la antikva semida kulturo estas la arama lingvo (la lingvo de Sirio), la akada lingvo (de Mesopotamio), la egipta lingvo (iom malpli parenca al la hebrea ol la sanskrita al Esperanto), k.a.

Sed kio plej gravas por ni estas la revivigo de la lingvo por moderna uzo. Unusence, ankaŭ tio havas paralelon en Esperanto, ĉar same kiel la hebrea, Esperanto estas lingvo intence elektita por speciala celo. Ambaŭ estas ekzemploj kiuj pravas la maturecon de la homa menso, kiu kapablas efektive "regi" sian lingvon.

EN ISRAELO: MODERNA SOCIO BATALAS KONTRAŬ ANALFABETECO

"Antaŭ unu jaro, preskaŭ ĉiuj vilaĝaninoj kvitancis siajn leterojn per fingro-premaĵo. Nun jam ili insistas skribi sian nomon."

Tiu rimarko de poŝtisto en iu moŝavo (malgranda terkultura komunumo) en Negevo ilustras la sukceson de la kampanjo kontraŭ analfabeteco, kiun lanĉis en Israelo en decembro, 1963, la Ministrejo de Eduko kun helpo de la armeo.

Pli ol 200 israelaj soldatinoj pasigas sian tutan militservon sur enlanda fronto: en la paca batalo kontraŭ analfabeteco.



Israelo, al kiu amase enmigris civitanoj el ĉiuj terpartoj kaj el ĉiuj sferoj de la vivo, frontas la edukajn problemojn same tiel de evoluinta, kiel de neevoluinta nacio. Ankoraŭ 10,3% el la loĝantaro inter la aĝoj 20 kaj 50 estas analfabetaj. Tiuj troviĝas plejparte en la kamparo — antaŭnelonga enketo montris, ke pli ol duono de la plenaĝuloj en 120 agrokulturaj komunumoj sciis nek legi nek skribi en kiu ajn lingvo.

Sed krom analfabeteco Israelo frontas ankaŭ alian problemon: la instruado de la hebrea. Por multaj enmigrintoj, la hebrea estas tute nova lingvo, tamen ĝi estas la oficiala lingvo de la lando, kaj por enhejmiĝi en la nacion necesas ĝin lerni.

Soldatinoj instruas en vilaĝo

La kampanjo kontraŭ analfabeteco komenciĝis en la sudo, en 52 moŝavoj plejparte loĝataj de novaj enmigrintoj. En tiu regiono troviĝis ne multaj instruistoj, do oni alvokis soldatojn — aŭ pli ĝuste soldatinojn, ĉar en Israelo la soldata servo estas deviga por ambaŭ seksoj. Sesdek kvin soldatinoj, ĉiuj abiturientaj, disiris en la vilaĝojn — unuope aŭ duope laŭ la grandeco de la komunumoj — por instrui skribadon kaj legadon.

El Negevo, la kampanjo disvastiĝis al aliaj regionoj, precipe al la vilaĝoj inter Tel Aviv kaj Jerusalemo. Tie instruas profesiaj instruistoj kaj studentoj. Sed ankaŭ nova grupo de soldatinoj baldaŭ vizitos loĝlokojn en Galileo. La kampanjon partoprenas entute pli ol 1500 instruistoj: 800 lerneaj instruistoj, 500 volontuloj kaj 225 soldatinoj.


La hebrea en kvin monatoj

Dum en la kamparo daŭras la batalo kontraŭ analfabeteco, la hebrea estas instruata ankaŭ je nivelo multe pli alta, nome en specialaj institucioj nomataj "ulpanoj". Tiuj ĉi estas diversspecaj: ulpanoj starigitaj en agrokulturaj komunumoj instruas duontage, kaj la enmigrintoj laboras kaj kunvivas kun la aliaj kibucanoj dum la alia tagduono. Aliaj ulpanoj akceptas enloĝantajn lernantojn por 5- ĝis 6-monata intensa kurso.

Iliaj rezultoj estis kelkfoje mirigaj. Oni aŭdas pri profesoroj, kiuj enmigris sen eĉ unuvorta scio de la hebrea kaj post kvin monatoj jam komencis prelegi en tiu lingvo en la Hebrea Universitato en Jerusalemo.

Ankaŭ grandega nombro da kuracistoj, juristoj kaj inĝenieroj sukcese finis tiajn kursojn. La sukceso de la ulpanoj ŝajne baziĝas sur la metodo zorge ekzameni la lernantojn kaj grupigi ilin laŭ klereco kaj kulturo, sed ne laŭ nacia deveno. Tiel ili ricevas instruadon adaptitan al ilia lernokapablo. Samtempe ili profitas ne nur el unuaranga lingvo-instruado sed ankaŭ el detala programo, kiu celas helpi ilian asimiliĝon en la nacion.

(Unesko-Novaĵoj)



S-ro Georgo Abraham: loĝanto de Argentino, unue konatigis sin internacie per belliteraturaj tradukoj el la araba lingvo, aperintaj interalie en "Esperanto", "Heroldo de Esperanto" kaj "Argentina Esperantisto". Lia nuna laboro, pri kiu ni raportas sube, estas multe pli ambicia.

LA MANKANTA VORTARO

Esperanto jam estas tiel disvastigita, ke ĝi estas lernebla per multaj lingvoj, eĉ per la orientaj kiel la ĉina, la japana kaj aliaj.

Lastatempe U.E.A. lanĉis la kampanjon APO — nun nomitan Afriko-Azio — por akceli la eniĝon de la Internacia Lingvo en tiujn kontinentojn. Pro inspiro de tiu kampanjo, kaj kun la deziro kunhelpi je la disvastigo de Esperanto sur la arablingvaj teritorioj, nun estas verkata la manuskripto de la unua granda Vortaro Araba-Esperanta. Ĝia aŭtoro estas sinjoro Georgo Abraham loĝanta en Argentino. Li estas poligloto kun animo de lingvisto, kiu ofte okupiĝas pri lingvaj temoj. La esperantistoj jam havis okazojn ĝui la belegajn poemojn de la fama Siria poeto, K. Ĝibran, de li tradukitajn el la araba.

S-ro Abraham konscias pri la graveco de sia tasko, kaj tial li serioze entreprenis la verkadon de la supre dirita vortaro. Estas bone sciate ke vortaristoj, ĝenerale, malabundas en ĉiuj lingvoj, des pli en Esperanto; kaj, supozante ke oni volus komisi kompetentulon redakti tian vortaron, kiun, do, oni komisius?

Araba lingvo estas tre grava en Oriento, kaj ĝi estas parolata en la tuta Nord-Afriko, kaj de la turka limo norde de Sirio ĝis la Akaba golfo sude de Sirio. Krome, ĝi estas la "oficiala" lingvo de pli ol tricent milionoj da Islam-religianoj disloĝantaj en Afriko kaj Azio. Kaj ĝi estas la kulturlingvo de multaj nacioj.

La araba lingvo rolon gravegan ludis en la historio. Laŭ aserto de Enciklopedio "Espasa", la hispana lingvo "heredis" ĉirkaŭ 25-0/o-oj el la araba.

Por ni, esperantistoj, estas ĝojige ekscii pri tiu afero, tio estas pri la preparado de Esperanta vortaro en lingvo ankoraŭ relative nova en nia bibliografio.

Kvankam la araba lingvo multe malsimilas Esperanton je sia strukturo, tamen, en kelkaj aspektoj, ĝi iom similas, strukture, la Internacian Lingvon. Akuzativo ekzistas en la araba; artikolo difina troviĝas nur unu, kaj artikolo ne difina ne ekzistas. La serĉado de vortoj en

vortaro okazas tiel same kiel tiu de la Esperantaj vortoj en vortaroj de Esperanto: oni serĉas la radikojn kaj el ĝi oni eltiras la diversajn derivaĵojn, sed ne kun la preciza reguleco de la Esperanta gramatiko..., kompreneble.

La laborado super la araba-Esperanta vortaro progresas tre malrapide*, ĉar s-ro Abraham faras tion dum siaj liberaj horoj, kiuj ne estas multaj, kaj ĉar li devas alfronti gravan malhelpaĵon: li ne posedas skribmaŝinon kun araba klavaro. Li skribadas ĉion permane, eĉ la netaĵojn.

Jen ni prezentas al niaj legantoj bildon montrantan unu paĝon el la manuskripto de la nun verkata Araba — Esperanta Vortaro, la "mankanta vortaro" en la Bibliografio de Esperanto.

H. P.

* Ĝis nun estas verkita ĉ. unu kvarono.

Subaĉeti; korupti.	بُرْطَل ①
Subaĉeti(aĵ)o; korupti(aĵ)o.	بُرْطَلِيل . رَشْوَة .
Esti nigra, malluma (nokto).	بُرْطَم ②
Koleri.	— وَ تَبْرَطَم .
Superi.	بُرْع . قَاف .
Donaci; volonte kontribui.	تَبْرَع . — بِر ...
Kompetenteg(eo); lerteco; kapablego.	بِرَاعَة . تَهَارَة
Donac(aĵ)o; volonta kontribu(aĵ)o; volonta kontribu(ad)o.	تَبْرَع .
Donac-anto, -into; volentu kontribu-anto, -into.	مَنْتَبْرَع . مُعْطِي .
Kompetenteg-a, -ulo; lert-a, -ulo; kapableg-a, -ulo.	بَارِع . مَاهِر .
Burĝono.	بُرْغَم , بُرْغوم , بُرْاعِم و بُرْاعِم
(Ek)burĝoni.	بُرْغَم
Havi pulojn (lako).	بُرْغَم (الكان)
Pulo.	بُرْغَمُوت , بُرْاغِث
Salikoketo.	— أَلْبَر
Kuloj.	بُرْغَم . بُرْغَمُوت .
Kulo.	بُرْغَمَة
Sraŭbo.	بُرْغَمِي , بُرْاغِي : لَوْب , لَوَالِب
Purpuro; okarlati.	بُرْغَمِير ③

Nunjare forpasis cent jaroj de la tempo, kiam abato Gregor Mendel en Malnovbrna monaĥejo en Brno faris siajn en biotiko epokfarajn malkovrojn, kiujn li prezentis ĉe la kunsido de Naturscienca Societo en Brno en marto 1865. Kvankam tiutempe neniu komprenis la gravecon de liaj malkovroj, kiuj preskaŭ forgesiĝis, post lia morto diversaj biologoj venis al samaj esploraj rezultatoj kaj la scienco Gregoron Mendel agnoskis kiel fondinton de genetiko.

En Brno okazas nunjare en aŭgusto Internacia Memora Simpozio, kiun partoprenos elstaraj genetikistoj kaj biologoj el la tuta mondo. En la Malnovbrna monaĥejo estos instalita memordomo de Mendel, kaj post la solenaĵoj en Brno okazos kunsidoj en Prago, kiuj pritraktos la problemojn de mutaciaj procezoj. La solenaranĝojn organizas Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj kaj la Moravia Muzeo en Brno sub aŭspicio de Ĉeĥoslovaka Komisiono por kunlaboro kun UNESKO, kaj en kunlaboro kun Internacia Unio de Biologiaj Sciencoj (IUBS).

Neniu komprenis

Kiam Mendel antaŭ 100 jaroj publikigis siajn malkovrojn, neniu komprenis la geniecon de

tiu ĉi modesta ano de la Malnovbrna monaĥejo en Brno kaj kiam li estis en j. 1884 enterigita, pri lia scienca laboro neniu jam eĉ rememoris.

Por la kreiva kresko de la genio de Mendel pozitive influis la familieca medio, kie Mendel maturiĝadis kaj la medio de la monaĥejo en Brno, kie li disvolvis siajn spiritajn kapablojn kaj en kvieto realigis ampleksan programon de esplorlaboro kaj la rezultatojn ekzakte prilaboris.

Mendel naskiĝis la 22-an de julio 1822 en vilaĝeto Hynčice. Lia patro estis kamparano. Ĉirkaŭ la farmdomo estis vasta horto, en kiu li greftadis la arbojn kaj kulturis tiam plej fekundajn speciojn de fruktarboj.

La malgranda Johano Mendel atentigis pri sia talento jam en la elementa lernejo en Hynčice kaj tiel li atingis la pli altan studadon. Jam tiam manifestiĝis lia sopiro je kleriĝo.

El la medio de sia gepatra domo kaj naskiĝvilaĝo li kunportis por la plua vivo amon al la naturo kaj vastan intereson pri la plantoj kaj bestoj.

Mezlernejon Mendel trapasis eminentprospere. En la jaro 1838 estis lia patro vundita kaj ne povis lin plu subteni ĉe la studoj. Juna Johano (pli poste Gregoro, r. de tr.) venis en malfacilan situacion kaj vivtenis sin per helpinstruado. En tiu tempo kaŭzis timo pri la necerta estonteco

La eksperimenta ĝardeno de Mendel en la malnovbrna monaĥejo. Maldekstre la monumento.



Antaŭ ĝuste cent

jaroj, nekonata moravia

monaĥo publikigis la

rezultojn de eksperimentaj

studoj kiuj metis la

fundamenton de la

moderna heredo-scienco.

Ĝis la morto li restis

nekomprenita,

sen la merititaj

omaĝoj, kiujn ni

hodiaŭ dediĉas al li.



kaj anima trostreĉiteco al li iom gravan malsaniĝon, tiel ke li devis interrompi la studadon. Pli poste dum la studado en la filozofia instituto en Olomouc li venis samkaŭze en pluan pezan krizon kaj malsaniĝis duafoje tiel grave, ke li devis por tuta jaro interrompi la studojn.

Poste en la monaĥejo li trovis eksterordinare favoran medion por ĉiuflanka disvolvo de sia talento merite de la grandanima, grandklara abato C. Napp. Post la fino de teologiaj studoj abato Napp venis renkonte al la sopiro de Mendel kaj post unujara sacerdota agado sendis lin instrui al gimnazio en Znojmo. En la lerneja medio sentis sin Mendel tre kontenta kaj entuziasme ekinstruis. Jam post unu jaro sendis lin la lernejdirektoro al la universitato en Vieno submetiĝi al ekzamenoj. Mendel ne sukcesis, verŝimile mankis al li tuteca universitata klerigo.

Sed li ne fortimiĝis de plua klopodo. Li ankaŭ ne perdis pluan subtenon de lia superulo. Abato Napp sendis lin por 2 jaroj al Vieno laŭorde studi la natursciencojn. De la universitataj studoj li revenis al Brno kredeble jam kun la ideo efektiviĝi aŭdacan vastan esploralaboron, kiu lin alkondukis — kiel li mem citas en la antaŭparolo de sia pliposta klasika laboro — "al solvo de iu problemo, kiu havas nesubtakseblan signifon por la historio

de evoluo de organikaj formoj".


La sekvintajn 10 jarojn, kiam li aktivis en Brno kiel instruisto de fiziko kaj naturscienco, kun granda diligento kaj koncentriĝo li praktikadis eksperimentojn pri hibridigo de plantoj, kaj en la jaro 1865 li publikis la rezultojn de la hodiaŭ gloraj malkovroj de la fundamentoj de genetiko. Lia malkovro estis por la tiama pensado tiel nova, ke ĝin neniuj komprenis.

En la jaro 1868 Mendel estis elektita abato de la monaĥejo kaj de post tiu tempo li povis sin dediĉi al sia eksperimenta laboro ĉiam malpli. Li seniluziiĝis, ke laboro, pri kies signifo li estis konvinkita, ne trovis rekonon kaj post plua laboro pri Hieraciumo li publikis jam nenion el tiu ĉi fako. Sian intereson pri la naturo li tamen ne perdis. Li dediĉis sin al abelbredado, hortokulturo kaj meteologiaj observadoj.

Antaŭ la fino de sia vivo li nevolonte parolis pri siaj eksperimentoj kun pizoj kaj nur iam li rimarkigis, ke foje liaj malkovroj atingos agnoskon.

En la tempo kiam ni rememoras kaj solenas la centan datrevenon de la Mendelaj malkovroj, ni kliniĝas antaŭ la genieco de modesta kaj persistema biologo, kiu estas hodiaŭ rigardata kiel patro de l' moderna genetiko.

Tradukis kaj komentis Jiří Kořínek



la jaro de internacia
kunlaboro, jaro de la
int. lingvo esperanto

LASTAJ PROGRESOJ DE LA SUBSKRIBO-KOLEKTADO

Dua ŝtatestro subskribis

Kun plezuro ni povas komuniki la ricevon de la subskribo de la dana ĉefministro J. O. Krag por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj. Lia apogo, kun tiu de la aŭstra prezidanto Franz Jonas, grave altigas la prestiĝon de la Propono, kaj donas firman precedencon, kiun povas sekvi aliaj ŝtatestroj. Inter la aliaj gravaj atingoj de la lasta monato ni mencias: d-ro Franz-Josef Röder, ĉefministro de Sarlando (federacia ŝtato de Germanujo); s-ro Hans Czettel, aŭstra ministro de internaj aferoj; s-ro Henry Grünbaum, dana ekonomiministro; s-ro Hukuda tokuyasu, japana ŝtata ministro; s-ro Hilmar Baunsgaard, dana eksministro pri komerco; s-ro K. Skytte, dana eksministro pri agrokulturo; s-ro Nobuo Yokokawa, guberniestro de Tochigi, Japanujo; s-ro Maurice Genevoix, konstanta sekretario de la Franca Akademio; prof. mag. J. v. d. Hoeven, rektoro de la Universitato de Amsterdam, kaj 18 aliaj eminentaj profesoroj kaj sciencistoj nederlandaj.

La ĉefurbestro de Düsseldorf, kaj parlamentanoj danaj, francaj, belga, japana kaj

hispana estas krome inter la miloj da pliaj subskriboj individuaj, kiuj portis la sumon (je 15 julio) ĝis 193 011 subskriboj el 49 landoj. Ĝis la sama dato subskribis 962 organizaĵoj kun entute 26 950 000 membroj. Inter la unuaj 167 000 individuoj troviĝas 44 membroj de registaroj kaj 291 parlamentanoj: el tiuj, 75 apartenas al la dana parlamento. Laŭlande, Germanujo restas en la unua loko, Belgujo en la dua, dum Hungarujo estas nun la tria plej granda kontribuinto.

Kontraŭe al la antaŭa plano, UEA nun decidis prezenti la Proponon al la Sekretariato de UN ne en oktobro, sed nur en la fino de la jaro aŭ en januaro. Tiel la disponebla tempo por kolektado de subskriboj konsiderinde plilongiĝis. En ĉiu okazo necesas ankoraŭ atendi la revenon de grandaj kvantoj da folioj el foraj landoj, kiel Japanujo, Koreujo k.a. Ĝis nun, el pli ol 180 000 folioj dissenditaj, revenis malpli ol 10 000. Se ĉe iu peranto mankas folioj, ankoraŭ ĉ. 20 000 en diversaj lingvoj estas riceveblaj de la C.O.

La prokrasto de la limdato ne signifas, ke oni prokrastu la agadon! Tute male, ĝi signifas ankoraŭ pli energian kaj ambician varbadon!

TRI KONGRESOJ

SKANDINAVIO

La Dua Nordlanda E-Kongreso okazis en Oslo de la 19-a ĝis la 24-a de junio, kun ĉ. 250 partoprenantoj. Inter la gastoj el pluraj aliaj landoj ĉeestis kiel Honora Gasto la prezidanto de UEA, prof. Lapenna. La aranĝoj, lokitaj en la Universitato de Oslo, inkluzivis jarkunvenojn de la nordlandaj asocioj, tri laborsekciojn pri lernejoj, gazetara agado, kaj la junularo, kaj imponan festkunvenon en la aŭlo de la Universitato. Ĉi tiu konsistis el festparolado de prof. Lapenna pri "La homaj rajtoj kaj lingva diskriminacio", sceno el "Peer Gynt", kantoj el la opereto "Blanka Ĉevalo", kaj aliaj elstaraj muzikaj kaj kulturaj eroj.

La Kongreso akceptis rezolucion, kiu rekomendis al nordlandaj edukaj instancoj antaŭenigi la instruadon de Esperanto okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. La televido kaj gazetaro de Oslo intervjuis prof-on Lapenna, kaj raportoj aperis en ĉiuj ĉefaj gazetoj de Skandinavio.

FERVOJISTOJ

La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) aranĝis de la 22a ĝis la 28a de majo 1965 sian 17an postmilitan kongreson vizititan de 430 fervojistoj en la norvega urbo Hamar. La festprelegon dum la solena malfermo faris lektoro Støp-Bowitz, la prezidanto de la Norvega Esperantista Ligo. Salutojn de la landaj asocioj transdonis delegitoj el 17 landoj. La komitato de IFEFF aprobis la novan statuton, informis sin pri la stato de

la terminara laboro kaj konstatis, ke horarojn kun tekstoj en Esperanto eldonas la fervojoj en Bulgarujo, Danlando, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Jugoslavio kaj Pollando. Temo de la faka prelego de kol. Engen estis "La nova vartarifsistemo de la Norvega Ŝtata Fervojo". En la najbara urbo Elverum oni inaŭguris la unuan Esperanto-straton de Norvegujo. La urbestro oficiale akceptis la komitaton. Okazis balo, bankedo, junularvespero, folkloraj kaj muzikaj prezentaĵoj, kaj ekskursoj. La publika intereso evidentiĝis per aktiva partopreno, favoraj komentarioj de la gazetaro kaj televida raporto.

REZOLUCIO

DE LA 47-a KONGRESO DE B.E.F.

EN OOSTENDE: 5-6-7/6/1965

La 47-a Belga Esperanto-Kongreso, okazanta en Oostende dum Pentekosto 1965

salutas U.E.A., kiu entuziasme gvidas la streĉan batalon por la triumfo de la Lingvo Internacia;

gratulas siajn grupojn kiuj sukcese plenumis sian taskon por la Propono al U.N.;

intencas ankoraŭ pli intensigi sian kampanjon por ke la J.I.K. estu ankaŭ la Jaro de la Lingvo Internacia;

decidas krome ne haltigi la klopodojn por progresigi la enkondukon de Esperanto en la lernejojn;

emfazas sian entuziasman konvinkon ke baldaŭ la Lingvo Internacia trovos sian merititan lokon, kiel senpera ligilo inter la kunlaborantaj popoloj.

Esperanto — moderna lingvo. Studo baze de la Fundamento, de V. Setälä, K.E. Vilborg kaj C. Stöp-Bowitz. Eld. Fondumo Esperanto, Helsinki 1965. 136 p. 14 x 10 cm., ofsetita, 3,75 gld. *

Same kiel "La Zamenhofa Esperanto", al kiu ĝi estas ia respondo, "Esperanto — moderna lingvo" estas malpli ĝenerala laŭ enhavo ol laŭ sia titolo. Enestas: antaŭparolo de W. E. Collinson, 11-paĝa studo de V. Setälä "Bazaj principoj de Esperanto kiel internacia lingvo", 45-paĝa "Memuaro pri la Esperanta pasivo" de E. Vilborg, kaj 74-paĝa studo "Esperanto — lingvo de moderna tipo" de C. Stöp-Bowitz. Sed la esenca enhavo de ĉiuj tri estas diskuto pri la Esperanta pasivo kun konkludoj favore al la atisma (tempa) sistemo.

La jenaj vidpunktoj ŝajnas esti komunaj al la tri aŭtoroj:

1. La zamenhofa uzo estas plejparte konforma al la itisma teorio, sed esceptoj estas troveblaj.

2. Tamen la pure tempa interpreto de la

participoj estas preferinda.

3. Tia interpreto ne malakordas kun la Fundamento.

Pri la unua el tiuj vidpunktoj oni povas konsenti. Nur pri la nombro de la veraj esceptoj, kaj pri la kaŭzo de tiuj esceptoj, oni povus diskuti. La dua punkto — la teoria preferindeco de pure tempa sistemo — estas afero subjektiva kaj nepruvebla sen specialaj premisoj. Sed la tria estas la plej grava. Tial ĉiuj tri aŭtoroj klopodas montri, ke nenio en la Fundamento refutas la atismon. Laŭ la opinio de la recenzanto, ili tamen malsukcesas ĉe la frazo: "Mia onklo... estis mortigita de neniŭ" (Ekzercaro 39.11), ĉe kiu la atistoj bezonas supozi, ke "estis" rilatas al la *kadavro* de la onklo. Tia interpreto de frazo, kiu en la Ekzercaro staras sen kunteksto, ŝajnas neakceptebla, kio implicas, ke ankaŭ la atismo entute estas neakceptebla. Dum ni rigardas la Fundamenton deviga, ĉiuj aliaj konsideroj estas ekster la temo.

V. Sadler

* Ricevebla ĉe UEA

Terminaro de kemiaj afiksoj, de Jan PIÓRO. Dua eld., la aŭtoro, Str. Reja 3/19, Piastow ĉe Varsovio, Pollando. 1965. 57 p. 21 x 15 cm., hektografita. Klarigoj en Eo.

Inter ekzistantaj ĥemiaj vortaroj tri estas dulingvaj, kaj du — tre malnovaj kaj malgrandaj laŭ la amplekso. Des pli bonvena estas moderna ĥemia difinvortaro, kies dua, plibonigita eldono nun aperis. La aŭtoro konsideras ĝin kiel bazon por plua laboro, kaj tute prave, ĉar la kreo de esperanta ĥemia nomenklatureto estas tasko superanta fortojn de unuopulo.

La libro enhavas nomojn de ĥemiaj elementoj kaj 125 afiksojn, inter kiuj estas kelkaj diskutendaj proponoj, kiel "serpent" per spiranoj, "acen" por kunkreskigitaj cikloj (diaceno = naftaleno); sed la plej interesa estas propono uzi por ĉiuj elementoj sufikson "i". Tamen ŝajnas, ke ĝi ne estas oportuna por *simplaj substancoj*, ĉar nomoj "plumbio", "ferio" (fero), "ozonio" k.t.p. sonas tro neuktime. Certe la libro ne estas senripoĉa, kelkaj difinoj bezonas ĝustigon, finaĵo "o", kiel liga vokalo, kaj kunmetitaj afiksoj (inil, enil k.a.) estas superflujaj; "endoimino" (nitrono), ilustranta uzon de prefikso "end", fakte havas alian strukturon, ne priskribeblan per ordinara distribuo de ligiloj. Sed entute la libro estas tre utila informilo por ĉiu ĥemiisto-esperantisto, kaj nepre meritas atenton.

B. V. Tokarev (Moskvo)

Jen estas helpo por vi, religia traktaĵo de Kristano Venkanta. Elangligis A. F. Doneis. Eld. la aŭtoro, Kanado, 1965. 56 p. 20 x 14 cm., ofsetita.

Resumo: La aŭtoro, usonano, prezentas per aro da mallongaj ĉapitroj la Evangelian Kristanismon kiel la solvon de ĉiuj hodiaŭaj problemoj, personaj kaj mondaj.

Esperantistoj estas ni, de Gé Roelofs kaj Lou Visser. Partoj I kaj II, kune 26 p. 22 x 17 cm. 17 originalaj kantoj kun muziko. Eld. la aŭtoroj, Amsterdam.

Fabeloj de H. C. Andersen. Tradukis d-ro L. L. Zamenhof. Unua Volumo, tria eldono. Heroldo, Bruselo, 1965. 237 p. 21 x 15 cm., il. 11,50 gld. (46 st.). *

Sub la ĉielo: Serio "Legu kaj lernu" n-ro 4. Eld. Faux, Britujo, 1965. 24 p. 17 x 11 cm., mult., il. 0,75 gld. (3 st.). *

Tra la Mondo. English Booklet. Course for the Study of the International Language Esperanto, de A. Ribot. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1965. 84 p. 18 x 19 cm. Anglalingva adaptaĵo por la konata disko-kurso (entuta kosto: 58,50 gld.). *

Esperanto the Aggressor Language (la lingvo de la agresantoj). Eld. Usona Armeo, Vaŝingtono, 1962. 233 p. 23 x 15 cm. Vortaro angla-Ea kaj Ea-angla kun frazaro. * (La "agresantoj" estas tiuj usonaj trupoj, kiuj reprezentas la malamikon dum ekzercaj manovroj.)

Dimitrovgrad, urbo de la VI E-ista Junulara Festivalo en Bulgario, 1965. Eldoninto ne indikita. 8 p. 20 x 14., ilustrita.

Szegedaj Liberaer-Teatraj Prezentoj 1965. Eld. Szegedi Szabadtéri Játékok, Szeged, Hungarujo. Senpaga programo-prospekto.

FIAT. Tero Maro Ĉielo. Eld. Presa kaj Propaganda Fako, FIAT, Torino, Italujo. Luksa kolorilustrita broŝuro pri la konata aŭto-entrepreno.

Certe triumfos la popolo de Vjetnamio!
Certe malvenkos la usonaj agresantoj! Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1965. 52 p. 26 x 23 cm. Foto-broŝuro.

Jarlibro de la Supera Financ-Ekonomia Instituto, Svištov, Bulgarujo, 1962-63. 519 p. 22 x 15 cm. En bulgara lingvo kun resumoj en Esperanto.

ricevitaj eldonaĵoj

esperanto
aŭgusto 1965

mallongaj novaĵoj



Vidu: Kemio

LAŬLANDE

Bulgarujo

- Prof. Vasil Peevski, rektoro de ISU en 1963, fariĝis prezidanto de la Plenuma Estraro de la Centra Konsilantaro de Sciencaj-Teknikaj Asocioj en Bulgarujo.
- En la lernojaro 1964/5 en la ŝtata universitato "Kliment Ohridski" en Sofio studis Esperanton 62 gestudentoj, kontraŭ 35 en 1962/3. El la supera grupo 12 studentoj sukcese ekzameniĝis kiel instruantoj. La oficiala lektoro estas s-ro Kunčo Vălev.

Ĉinujo

- Dum la instruaro 1964-5, dua grupo finis E-kurson en la Instituto de Filozofio de la Katolika Universitato Fu-Jen, Tajbej, Tajvan.

Germanujo

- Fondiĝis Esperanto-grupo en la Sarlanda Universitato Saarbrücken. Kurson vizitas 15 studentoj.

Hispanujo

- La Barcelona "Klubo de Amikoj de Unesko" ĵus fondis en sia fako "Oriento-Okcidento" Esperanto-sekcion.

Italujo

- En Udine la urbestro inaŭguros la 5-an de septembro 1965, sur la tiea kastelo, mozaikan monumenton al d-ro Zamenhof, donacita de d-ro A. Tellini. Personoj dezirantaj partopreni la festajn aranĝojn je tiu tago bv. sin anonci anticipe al s-ro G. della Savia, Via L. Moretti 11, Udine.

Svedujo

- La sveda sekcio de KELI en sia jarkonferenco en majo decidis dungi duan oficistinon, f-inon Ingilil Nilsson, ĉefe por agado inter la junularo. Jam de 1947 s-ino A. Alamo-Sandgren laboras profesie por la sama sekcio.

Svislando

- La ĉijara "Trilanda Renkontiĝo" okazos en Romanshorn, 25-26 sep., kun distra programo kaj inaŭguro de E-vojo. Informas O. Walder, Waldmannstr. 10, 8590 Romanshorn.

Vidu: Ĉinujo



Vidu: Italujo

LAŬFAKE

Kemio

- Jam aperis la unua, bele aranĝita eldono de "Kemio Internacia", la unua naturscienca periodaĵo en la historio de Esperanto. Jarabono estas 3,60 gld., pagebla per UEA. Detalojn vidu en "Esperanto" 1965, marto, p. 55.

Teksaĵindustrio

- S-ro Manfred Führer (Postfach 153, CH-4900 Langenthal, Svislando) serĉas kontakton kun fakuloj pri teksaĵoj kaj teksaĵindustrio. Celoj: kompili tiufakan terminaron kaj praktike apliki la Internacian Lingvon en tiu medio.



MEMORIGA KALENDARO

Aŭgusto

- 1-8 SAT-Kongreso, Karlsruhe, Germ.
- 8-13 Postkongresa ekskurso, Kansai-dist.
- 8-15 IJK de TEJO, Oocu, Japanujo
- 8-16 Int. Ferio-Semajno Krommenie, Ned.
- 8-20 Int. renkonto de LIBE, Gwatt, Svis.
- 10-20 Int. Pedagoga E-Tendaro, Szeged. Hung.
- 12-15 Postkongresa Rondo, Hongkongo
- 13-15 Int. Festivalo de Oomoto, Kameoka
- 22-28 Int. Ferio-Semajno Caslano, Svis.

Septembro

- 6-10 Int. Jun. Konf. pri lingvaj problemoj, Ljubljana, Jugoslavio (TEJO)
- 12 Sezono Grésillon finiĝas
- 13-23 Itala Kongreso, Rimini
- 24-26 Nederlanda Jub. Kongreso, Amersfoort
- 25-26 3-landa Renkonto, Romanshorn, Svis.

Oktobro

- 2-15 Int. Ferioj en Miedzygórze, Pollando
- 16-23 Brazila E-Kongreso, Rio de Janeiro
- 17-24 Aŭtunaj Feriaj Kursoj, Helsingør
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Decembro

- 3-5 Meksika Kong., Meksiko-Tenochtitlan
- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago, Tago de la Libro
- 27-2/1 Int. Sem. GEJ, Hamburg, Germanujo
- 31 Kongreskotizoj Budapeŝt plialtiĝas

LA INTERNACIA KARAVANO DE U.E.A. AL TOKIO

Dum la lastaj jaroj ni publikigis de tempo al tempo informojn pri la internacia aviadila vojaĝo de U.E.A. al Tokio (vidu i.a. la jul/aŭg. no. de "Esperanto" 1964, p. 137). La principo de tiu vojaĝo estis, transporti partoprenantojn en la plej mallonga tempo, en la plej komforta maniero kaj je la plej malalta prezo de Eŭropo al Tokio.

Ĝi ĝuis grandan interesigon de diversnaciaj kongresanoj. La origine planita aviadilo montriĝis tro malgranda. Kun plezuro ni povas nun informi, ke lundon la 26-an de julio forflugis el Amsterdam aviadilo de la tipo "Bristol Britannia" kun 112 kongresanoj de 15 diversaj nacioj. Ĝi sekvis sudan vojon kaj alvenis en Tokio merkredon la 28-an de julio (loka tempo). La sama grupo revenos en Amsterdam per la sama maŝino ĵaŭdon la 19-an de aŭgusto. La vojaĝon tute organizis la Centra Oficejo de U.E.A.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la julian numeron.

RADIO ROMA. 1-VIII, Italaj verkistoj: Antonio Fogazzaro; 8-VIII, Romaj preĝejoj: S-ta Georgo en Velabro; 15-VIII, Gondoloj sur la Venecia Laguno; 22-VIII, Leterkesto; 29-VIII, Kristana mondo. La dua parto de ĉiu disendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto", la unua parto al la ĉi-supraj temoj. Redaktoro: S-ro Luigi Minnaja.

RADIO GDAŃSK nun elsendas ĉiumerkrede anstataŭ ĉiulunde, de 06.20 ĝis 06.35. Sama ondlongo.

ĈINA RADIO nun uzas la jenajn ondlongojn por disendi la vendredajn kaj sabatajn programojn de 20.00 ĝis 20.30: 51.02 m. (5880 kcs), 47.85 m. (6270 kcs), 40.40 m. (7440 kcs), 39.37 m. (7620 kcs), 32.12 m. (9340 kcs), 30.11 m. (9965 kcs). La novaj programoj okazantaj sabaton kaj dimanĉon de 11.00 ĝis 11.30 kaj de 12.30 ĝis 13.00 estas speciale direktataj al orienta kaj sud-orienta Azio.

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *Nepre aranĝi* specialan vesperon okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj (24 oktobro), kun konciza prelego aŭ parolado pri la signifo de U.N. (Fontoj: "Aktualaj problemoj"; "Kontakto" 1965 vol. 2 n-ro 3; "Esperanto" 1965 junio, p. 102; aŭgusto, p. 142.)

2. *Informiĝi* (ĉe loka ekspozicia centro aŭ sim.) pri okazontaj komercaj k.a. ekspozicioj, kaj laŭeble aranĝi tie standon pri Esperanto kaj ĝia rilato al la temo de la ekspozicio.

3. *Instigi* la lokan turisman oficejon eldoni esperantlingvajn prospektojn, montrante specimenojn de lastatempaj prospektoj el aliaj urboj. (Tiajn liveras, kontraŭ afranko, la C.O. en Rotterdam). Sugesti samtempe, ke la oficejo utiligu la eblecon distribuigi tiajn prospektojn en la Universalaj k.a. Kongresoj de Esperanto. Ĝi petu detalojn pri tarifoj de la C.O. de UEA.

4. *Plue kolekti* subskribojn por la Propono al UN; eventuale organizi kolektadon de pordo al pordo.

Memore al GUSTAV WEBER

Antaŭ 20 jaroj, post plurmonata enkarcerigo en Vieno, mortis en koncentrejo Mauthausen (laborkomando de Gusen) s-ro Gustav Weber, iama kunorganizinto de la Internacia E-Muzeo.

La Gestapo arestis s-ron Weber, kune kun aliaj esperantistoj, pro kaŝa agado por Espe-

ranto dum la pasinta monda milito.

Al lia vidvino, s-ino Maria Weber, kaj al la filino ni esprimas niajn plej sincerajn simpatiajn sentojn.

JUAN RECOVER-RUZAFÁ

Antaŭ nelonge mortis en Guadix (Granada), Hispanujo, s-ro Juan Recover-Ruzafa, multjara membro kaj delegito de UEA.



nekrologo; memornoto

esperanto
aŭgusto 1965



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

Sceno el nacikostuma teatraĵeto



BRILA FESTIVALO DE BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

De la 2-a ĝis la 4-a de aprilo en "La Junulara Urbo" – Dimitrovgrad brile sukcesis la VI-a Tutlanda Esperantista Junulara Festivalo (TEJF) de la Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ). Ĝin partoprenis 1150 gejunuloj festivalanoj el 34 loĝlokoj kaj gastoj el Pollando, Jugoslavio, Italujo, Anglujo, Germanujo kaj Gvineo. Ĉe bonega organizado flanke de la tri lokaj E-societoj kaj la Junulara Unuiĝo en Bulgarujo pasis la multampleksa altnivela festivala programo, montrinta riĉan kulturan agadon per Esperanto de BEJ, kiu jam nombras 1400 membrojn.

2.IV. – Solena malfermo... Konferenco de BEJ... Salutkoncerto de lokaj amatoraj ensembloj... "Edziĝpropono" de Ĉeĥov en prezento de la Bulgara Esperanto-Teatro... Malfermo de riĉa kaj majstre aranĝita Esperanto-ekspozicio... Kronoj antaŭ la monumento de D-ro L. L. Zamenhof... Komuna fotado kaj vizito de "Tempo por amo" – opereto por la Festivalo prezentita... "Sofia Invitas" – interamika renkonta vespero, aranĝita de la Sofia Studenta E-Societo "V.Peeva".

3.IV. – Komenciĝis la esenca ero – prezentado de la festivalaj programoj flanke de la partoprenantaj junularaj kaj studentaj ensembloj kaj trupoj. La Festivala Jurio kun prezidanto Nikola Aleksiev (prezidanto de BEJ)

tutan tagon senripoze ĝis malfrua vespero laboris... tiom da partoprenantoj... programoj. En la ĝenerala klasado unuan lokon okupis la Junulara Ensemblo el Vraca, sekvis tiuj el Miĥajlovgrad, la Sofia Studenta Societo "Vela Peeva" k.a. Notinde reprezentigis la ensembloj el Ĥaskovo, Dimitrovgrad, Plovdiv, Jambol, Kazanlak. Individuaj premiitoj: 29 gejunuloj pri la diversaj artobranĉoj. Vespere la saman tagon okazis la tradicia Printempa Balo, kiun ĉeestis kune kun la gastoj pli ol 1500 gejunuloj. En 4 ejoj kun lertaj estradaj orkestroj kaj profesiaj artistoj, konkursoj kaj gajaj ludoj, elekto de "Rozo de la Festivalo" kaj aliaj distraĵoj pasis neforgeseblaj horoj de amuziĝo, dancoj...

4.IV. – Oratora Konkurso pri ses temoj kaj 7 kandidatoj. Plej bone kaj per elokventa parolado partoprenis en ĝi Nikola Pilev el Ĥaskovo, sekvis Ĥaĉik Ĥaĉikjan kaj Zlatka Milĉeva (el Ĥaskovo kaj el Jambol), Jordan Angelov el Plovdiv k.a.

"Televid-Konkurso" pri tri temoj kaj kun 10 kandidatoj. Laŭvice estis premiitaj: Jivko Kolev (St.Zagora), Straĥil Dimitrov (Vraca), Georgi Dobrev (Ruse) k.a.

Oficiala fermo kaj disdonado de la premioj okazis posttagmeze kaj sekvis Plenkunsido de BEJ kun vasta ĉeestantaro de aktivuloj kaj oficialaj NE-representantoj. Estis pridiskutitaj la rezultoj de la VI-a TEJF kaj la ĉefaj demandoj pri la sekvanta VII-a Festivalo dum aprilo 1966. En la organiza parto de la kunsido la Sekretario de BEJ – Dimitr Jdrakov – faris raporton kaj notis la ĝisnunajn sukcesojn en BEJ enkadre de la "Jaro de Internacia Kunklaboro" kaj la kampanjo "1965 – Jaro de la Bulgara Esperantista Junularo". Fine la kunsido akceptis novajn gravajn decidojn pri la estonta aktivado de BEJ.

Okazis ankaŭ oficiala bankedo, koktelfesto, kelkaj ekskursoj kaj renkontiĝoj kun la loka junularo. Kaj jen – finiĝis la neforgesebla Festivalo, signanta refoje florantan kaj sperte gvidatan junularan movadon esperantistan. Vastan reĥon akiris la Festivalo en la centra kaj loka gazetaro, radio kaj informservoj. (Raportis: Dimitr Jdrakov kaj Vasja Petrova)

Ensemblo el Vraca, unuapremiita inter la kolektivoj



Juna esperantisto, pensante pri novjaro pensas pri la internacia seminario de GEJ. Se la ĵusaj ferioj ne tro forprenis viajn energiojn kaj monon, tiam jam nun atentu la **9-an internacian seminarion**; ĝi okazos de 27 dec. '65 ĝis 2 jan. '66 en la ĉijare finkonstruita, modernega junulgastejo de Hamburg-Horn.

Pri la temo de la seminario: "Li kaj Ŝi" – junaj homoj en la moderna mondo – prelegos diverslandaj kompetentuloj el la fakoj sociologio, psikologio, pedagogio, teologio kaj juro. La seminario celas per prelegoj kaj diskutoj analizi la rilatojn inter la junaj homoj sub la nuntempaj vivkondiĉoj.

Cetere la programo konsistas el: Interkona vespero, oficiala akcepto, vizito al la urbo, publika vespero, novjara ekskurso, silvestra balo.

En la seminario partoprenos junaj personoj inter 16 kaj 35 jaroj. Frua aliĝo estas konsilinda, ĉar la nombro de partoprenantoj estas limigita al 80.

KOTIZOJ: (inkluzivas loĝadon, manĝaĵojn kaj la programon en la junulgastejo)

	ĝis la 31.7.65	post la 1.8.65
malpli ol 25jaraĵ	60,- GM	65,- GM
pliaguloj	70,- GM	75,- GM

Gejunuloj malpli ol 25jaraĵ ricevos repaĝe duonon de la vojaĝkostoj sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo kaj ĉ. 10,- GM el la kotizo.

Aliĝilojn bonvolu sendi al la Organiza Komitato de la 9a Internacia Seminario p/a Eliza Weide, Nordalbingerweg 65, **2 Hamburg 61**, Germanio. Bonvolu samtempe ĝiri antaŭpagon de 10,- GM al la poŝtĉekkonto Hamburg n-ro 151374 (por Eliza Weide) aŭ sendi la sumon al la adreso de la OK. Aliĝiloj sen antaŭpago principe ne validas kaj ne estos traktataj.

Post la 1.12.1965 la OK ne plu akceptas aliĝojn. La OK rezervas al si la rajton, ankaŭ jam antaŭ la limdato rifuzi aliĝojn.

Pri seminariaj aferoj (programo, partopreno el eksterlando k.s.) oni korespondu kun: Germana Esperanto-Junularo, Eksterlanda Fakoj, Gemarkenstr. 146, **5 Köln-Dellbrück**, Germanujo. Orienteŭropaj partoprenantoj petu specialan invitleteron kiel eble plej frue ĉe la Eksterlanda Fakoj de GEJ.

STUDENTA RONDO PARTOPRENAS KONFERENCON

En la kadro de la VII-a Landa Scienca Studenta Konferenco, kiu enhavis socisciencon, juran, ekonomian, historian, literaturan, lingvistikan, pedagogian, psikologian, filozofian, matematikan, fizikan, geografian k.a. sekciojn sub gvido de universitataj profesoroj kaj kun prelegoj de studentoj, unuafoje partoprenis la Esperanta Scienca Studenta Rondo de la budapeŝta universitato ĉe la jura fakultato. Sub gvido de prof. d-ro István Szerdahelyi studentino parolis pri la internacieco de la mezepokaj universitatoj. Hungara studento parolis pri la problemoj de la diplomata lingvo. En la programo estis eksterlandaj gastoj: Jonathan Hamilton, angla docento, parolis pri la lingvaj problemoj de la matematiko. Jordan Kazakov (Politeknika Ĉeflernejo, Ruse, Bulgarujo) pritraktis la uzon de instrumaŝinoj. Itala gasto, Gianni Paulo Fantuz el la universitato de Bologna, preparis referaton, kiun laŭtlegis Zdislaw Blazejczik, docento el Gdansk. Ĝi temis pri la uzo de Esperanto en interuniversitataj rilatoj. La kvara eksterlanda preleganto, Viorel Paltineanu (Universitato de Cluj) prilumigis la internaciecon de la esperanta vortrezoro. La gazetaro dediĉis apartan atenton al tiuj prezentoj.

Aparte bela, esperantlingva presaĵo informis nin pri la ĝojiga fakto, ke Claudine Patoz kaj Michel Turin, ambaŭ aktivaj membroj de TEJO, geedziĝos je la 5-a de julio en la urbodomo de Villeurbanne. Volonte ni esprimas al ili korajn gratulojn kaj bondezirojn!

NEFERMITA LETERO

Estimataj,

En la daŭro de la tri lastaj monatoj 8 Esperanto-kursoj estas fonditaj ĉe la universitato de Ceará, Brazilo. Ili ampleksas 155 lernantojn, el kiuj 41 geknaboj. Novaj klasoj baldaŭ ekfunkcios.

Tiu atingo nun instigis al nova paŝo: kreo de Esperanto-Centro de Internacia Kulturo

Tiu centro diskonigos la internacian kaj nacian vivon per Esperanto. Por atingi tiun prestiĝan celon, ni nepre bezonas vian helpon. Kun aprobo kaj apogo de Brazila Esperanto-Ligo, ni turnas nin al vi, petante la alsendon de: libroj en Esperanto (originalaj aŭ tradukitaj), lernolibroj ĉiuspecaj, vortaroj, ĉiaj eldonaĵoj (informiloj, bildkartoj, varbiloj), flagetoj, revuoj en Esperanto, diskoj, kaj ĉio alia, kio laŭ via opinio prilumas la kulturan, folkloran, ekonomian kaj aliajn aspektojn de via lando.

Paulo A. Cardoso (Del. de UEA).
Av. Visconde Cauipe 2899
Fortaleza – Ceará – Brazilo.

EN FRANCUJO

La franca televido dediĉis elsendon al la "Muelejoj de Meti-lernantoj" – internacia volontula grupo kiu dumferie faras konstruan laboron (i.a. ĝi starigis pavilonon "Esperanto").

La Duan Semajnfina Renkontiĝo de JEFO partoprenis 29 francaj TEJO-membroj. Ĝin organizis sukcese la studenta rondo en Aix-en-Provence, je 24.3.'65.

En le Havre, loko de la 57-a nacia kongreso, la franca junularo (JEFO) okazigis sian kunvenon je 7 junio. Interalie nova estraro estas elektita.

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Wien VD: S-ro F. Höfert, emerito, Wien XIV., Penzingerstrasse 121; tel. 8227104.

Belgujo

Ganshoren (Brabant) 17 000

D: S-ro Hector Castel, vicoficejestro R.T.T., 29 square du Centenaire; tel. 256208.

Britujo

Bingley D: vakas.

Chorley (Lancs) 30 000

D: S-ro R. H. M. Markarian, lernejestro, 2 Hazel Grove, Hartwood Park; tel. 4572 aŭ 4596.

FD (Edukado): la D.

FD (SOS-aŭto-servo): la D.

Surbiton D: vakas.

Ĉeĥoslovakio

Bratislava FD (Instruado): s-ro Vojtech Heimlich, muzikprofesoro, Nám. 1. Mája 20/A; tel. 55351.

FD (Muziko): la FD (Instruado)

Ĉinujo

Taipei (Taiwan) 1 150 000

D: Pastro Se-ĉien Kao, universitata profesoro, Fu-Jen Catholic University, Hsinchuan, Taipei-hsien; tel. 351 kaj 371.

FD (Kulturaj aferoj): la D.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1965

Stato je la 30-a de junio

Konkurso I

Lando	kvoto poentoj %		
1. Finnlando	2365	2555	108,03
2. Svislando	1800	1815	100,83
3. Hispanujo	2804	2795	99,68
4. Nederlando	5140	5011	97,49
5. Germanujo	6551	6255	95,48
6. Britujo	6053	5637	93,13
7. Francujo	7009	6525	93,09
8. Usono	3827	3500	91,46
9. Norvegujo	1490	1275	85,57
10. Brazilo	3411	2803	82,18
11. Svedujo	6190	5005	80,86
12. Belgujo	1770	1430	80,79
13. Italujo	3932	2725	69,30
14. Danlando	2704	1825	67,49
15. Japanujo	3745	2130	56,88
16. Jugoslavio	3295	1785	54,17

Konkurso II

1. Aŭstrujo	1090	1250	114,68
2. Kanado	702	739	105,27
3. Aŭstralio	1288	1253	97,28
4. Israelo	405	340	83,95
5. Islando	250	205	82,—
6. Nov-Zelando	1195	940	78,66
7. Sudafriko	250	185	74,—
8. Madagaskaro	250	110	44,—
9. Argentino	760	295	38,82
10. Urugvajo	250	65	26,—
11. Portugalujo	380	40	10,53

(Vidu la regularon en "Esperanto" 1965, p. 38)

Danlando

Århus FD (Invalidaj aferoj): S-ro Manuel M. Heidun, librovendisto, Ellemarksvej 12, Århus C; tel. (061) 43693.

Randers JD: S-ro Ole Elklit, gimnaziano, Baldersvej 22; tel. (064) 27352.

Finnlando

Karttula (Kuopion lääni) 5 300

D: S-ro Juhani Vilkki, licea instruisto pri matematikaĵoj; tel. 88.

Francujo

42 La Ricamarie (Loire) 12 000

D: S-ro Marius-Jacques Dony, instruisto, 45, rue de la Libération.

Germanujo

Speyer FD (Matematiko): S-ro Helmut Rössler, gimn. instruisto, 672 Speyer, Am Woogbach 38; tel. 4581.

Wiesbaden FD (Kemio kaj elektroniko): vakas.

Hispanujo

Madrid D: la FD (Fabrikado)

Koreujo

Seoul VD: S-ro Ki Ho Pai, farmaciisto, San 8-I Bondong, Youngdungpo; tel. 48170.

Pollando

Gdańsk JD: S-ro Zdzisław-Błazejczyk, instruisto, Gdańsk-12 skrytka pocztowa 15; tel. 41-15-24.

FD (Filatelo): la JD.

Svedujo

Stockholm FD (Filatelo): vakas.

FD (Magio): vakas.

FD (Turismo): la antaŭa FD (Filatelo).

Svislando

Bellinzona FD (Interlingvistiko): la JD.

Usono

Gray (Maine 04039) 1 500

D: S-ro Robert Sparks, pastro; tel. (207) 657-3461.

FD (Religio: evangelia kristanismo): la D.

San Marcos D: vakas.

Washington D.C. FD (Agrikulturo): S-ro Robert L. Davis, ĵurnalisto, 9608 48th Place, College Park, Md. 20741; tel. 935-5341.

FD (Ĵurnalismo): la FD (Agrikulturo)

FD (Muziko): S-ro Sergio Docal, muzikisto-tradukisto, 2947 Tilden St., N.W., Washington D.C., 20008; tel. 362-2459.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Kreykenbohm, s-ro B., Bremen, Germanujo.
Selms, f-ino J. van, Hago, Nederlando.
Väisälä, prof. d-ro Vilho, Finnlando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

344. Albuquerque, d-ro José J. de; 345. Costa, f-ino Yolanda de Araujo, Brazilo; 346. Strangman, s-ro P. G., Britujo; 347. Schleicher, s-ro Ib, Danlando; 348. Bechtold, s-ro Ludwig; 349. Hollnagel, d-ro ing. Wilhelm, Germanujo; 350. Carrfors, s-ino Solvig; 351. Ekman, s-ro Arne; 352. Lundquist, f-ino Gurli; 353. Sedendahl, s-ro Bryngel, Svedujo; 354. Jungton, f-ino Emma; 355. Kennelty, s-ino M., Usono.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO (gld.)

Gregory, s-ino E.; 5,80, Britujo. Becker, s-ro P.; 5,40; Urban, s-ro W.; 0,90; Germanujo.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Beek-Kelly, s-ino A. C. H. v. d.: 500 gld.
Cate, s-ro H. J. ten: 5 gld.
Waal, s-ro v. d.: 4 gld.; Nederlando.
Bengtsson, s-ro Karl: 17,36 gld.; Svedujo.

Aparte grandan dankon al s-ino Beek-Kelly, kiu jam la duan fojon donacis 500 gld. por ĉi tiu speciala fondaĵo!

FONDAĴO CANUTO

Fielding, s-ro C., Britujo: 1 J-MA.
Härkänen, s-ro A., Finnlando: 1 MA.
Helsingius, s-ino, Finnlando: 1 MA.
Laitinen, s-ro Eero, Finnlando: 1 MA.
N.N., Finnlando: 1 MA.
N.N., Finnlando: 2 MA.
Ohme, s-ro A., Irschenberg, Germ.: 1 MA.
Hendriks s-ro P., Nederlando: 1 J-MJ.
Stichting Levi Lassen, Nederlando: 50 MA.
Moerbeek, s-ro R., Nederlando: 5 MA.
Postma, f-ino Tj., Nederlando: 2 MA, 1 MJ.

Storm, s-ro B.C., Nederlando: 1 MA.
Vries, s-ro A. de, Nederlando: 1 MJ.
Bohman, f-ino Magda, Svedujo: 34 MA, 1 J-MA.
Carlén, s-ro Erik, Svedujo: 3 MA.
Cimonte la Fondaĵo konsiderinde kreskis pro la kontribuoj de la Fondaĵo "Levi Lassen" en Hago kaj de f-ino Magda Bohman en Svedujo. Ni tre kore dankas!

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto, omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. Ekde tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO

Isaac, s-ro Nassif, Kuvajto: 10 gld.

PATRONA MEMBRO DE TEJO

Stubley, s-ro G. A., Ossett, Britujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

Astrid — ĉu vi estas retrovebla? Skribu interstene al: BM/DMDF, Londono.

F-ino Siri Linnander pro grava malsano ne povas respondi la leterojn de siaj karaj kaj fidelaj geamikoj en Italujo, Germanujo kaj aliaj landoj. Varmajn salutojn al ĉiuj!

Egipta ĵurnalisto deziras korespondi pri vegetarismo, metafiziko, historio. Interŝanĝas poŝtmarkojn, diapozitivojn, sonbendojn; sendas egiptajn Esperanto-glumarkojn. Tados Megalli, 8191 Münsing, okc. Germanujo.

Ĉiu homo deziras vivoĝojon, sed ne ĉiam atingas ĝin. Tial estas treege grava demando, ĉu la vivo estas nura hazardo, aŭ ĉu ĝi funkcias laŭ certa sistemo, kiun oni povas lerni koni. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Petas informojn pri uzo de kaŭĉuko por vestoj kaj piedvestoj alilande: BM/FECJ London W.C.1, Anglujo.

20 geknaboj 14-15-jaraj deziras per korespondado amikiĝi kun ĉiulandaj samaĝuloj. Sendu bildkartojn; ni nepre respondos. Adresu al s-ro Jaroslav Grodl, Přibyslav-ZDŠ, distr. Havl. Brod. Ĉeĥoslovakujo.

Virgílio Moura Santos, Rua Estácio Dias, 18, r/c D, Lourenço Marques 5, Mozambiko, interŝanĝas novajn kaj uzitajn PM aŭ akceptas, rekompence, iujn ajn artiklojn. Skribu Esperante aŭ france.

"Neperforto" aperas dumonate, enhavas raportojn, novaĵon, pri praktiko de neperforto fronte al konfliktoj. Abonu (20 steloj) tuj por ricevi unuan numeron senpage, aŭ sendu respondkuponon por specimeno al D. Faux, 4 Brunswick-sq., Gloucester, Anglujo.

Poŝtmarkalbumoj laŭ-temaj, nigraj kaj blankaj paĝoj, ilustritaj kartonkovriloj, 15 x 20 cm., ses titoloj. Po 4 steloj: serio de ses, 20 steloj. Mendu ĉe D. Faux, 4 Brunswick-sq., Gloucester, Anglujo.

Por varbpanelo de ekspozicio ni bezonas ilustritajn poŝtkartojn de la ĉefurboj de ĉiuj landoj. Respondo garantiata per ilustrita poŝtkarto. Skribu nomon kaj adreson preslitere. Esperanto, 58 rue Gaillard, 62-Calais, Francujo.

Bv. sendi il. pk. kaj ĉiujn Esperantaĵojn por Ekspozicio septembra. S-ro Juan Lopez-Casteleiro, Str. Cedeira 8, 1º dcha., El Ferrol del Caudillo, Hispanujo.

Nova grupo eble stariĝos en Septembro. Por kuraĝigi la komencantojn bonvolu sendi gratulojn al ABRC Esperanta Sekcio, ĉe 39 Tiltanburn Road, Newarthill, Lanarkshire, Skotlando, Britujo.

Paŭlo Zulker havas grandan aron da P.M., kaj pro tio deziras interŝanĝi p.k. kun la tuta mondo. Adreso: Casa Resende, Resende (RJ), Brazilo.

Por fari grandan kaj belan ekspozicion pri la utileco de Esperanto al la loĝantoj de nia urbo, kaj al diversaj gimnazioj, kiuj povos ankaŭ lerni Esperanton, bonvolu sendi p.k., belajn kaj ilustritajn, el via lando kaj urbo. Adreso: Prof. Corrêa Neto, 15 de Novembro 228/304, Niterói, Brazilo.

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Geonkloj Esperantistaj helpas la infanojn de nia movado per korespondado. Petu detalojn. 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Por internacia Esperanto-ekspozicio en septembro estas bezonataj Esp.-prospektoj, afiŝoj, fotoj, infandesegnaĵoj, filatelie afrankitaj leteroj ktp. Rekompencos Bridlingtona Esperanto-Klubo, 68 Windsor Crescent, Bridlington, Yorks., Anglujo.

oficiala informilo

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

esperanto
aŭgusto 1965

Lastmomente

EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO

Vieno, la 14-an de julio. — Hodiaŭ matene je la 10-a horo la Prezidanto de Aŭstrujo, s-ro Franz Jonas, akceptis delegacion de 14 personoj. En perfekta Esperanto la Prezidanto alparolis la delegacion de la Konferenco kaj esprimis bondezirojn por sukcesa laboro. En la nomo de la delegacio la Prezidanto de U.E.A., prof. I. Lapenna, dankis al la Prezidanto de Aŭstrujo pro la akcepto, pro la apogo kiun li daŭre donas al la Esperanto-movado, interalie ankaŭ pro la subskribo de la Propono prezentota al Unuiĝintaj Nacioj. Prof. Lapenna akcentis, ke tiu ĉi estas iasence historia evento, ĉar la unuan fojon Respublika Prezidanto alparolas internacian konferencon en la Internacia Lingvo. La Prezidanto restis en neformala konversacio kun la membroj de la delegacio dum pli ol duona horo.

MONUMENTO EN LINZ INAŬGURITA

Brile sukcesis la oficiala inaŭguro, la 10-an de julio, de la unika Esperanto-monumento en Linz, Aŭstrujo. La urbestro malkovris ĝin meze de la urbo en ĉeesto de aŭtoritatuloj de la urbo Linz kaj de la liglando

Supra-Aŭstrio. La festparoladon faris nia ŝatata prezidanto d-ro Ivo Lapenna. Salutis dek tri delegitoj: Anglujo (A. Middlemast), Belgujo kaj "Heroldo" (Ada Fighiera-Sikorska), Finnlando (N. Narvala), Francujo (G. Dassonville), Germanujo (L. Pickel), Nederlando (C. Burger), Pollando (s-ino Gaveron), Svisujo (E. Zuber), Aŭstrujo (R. Cech), Katolika E-Unuiĝo (W. Mudrak), GEFA (E. Kiefer), AFEF (W. Huber) kaj la iniciatinto de la unua E-monumento en Aŭstrujo (H. Steiner el Wörgl). En la nomo de la liglanda registaro parolis landa konsilisto Pritsch. La urbestro, nacia deputito Edmund Aigner trafe priskribis la signifon de la moderna plastikajo, la unua en la mondo en tiu ĉi stilo. La tuta, tri metrojn alta figuro konsistas el veldita aluminio-lado. La cilindro-forman nigre koloritan soklon ornamas la surskribo: ESPERANTO — LA LINGVO INTERNACIA DE D-RO L. L. ZAMENHOF 1859-1917.


Ĉiuj parolantoj dankis al la monumenta komitato pro la persistaj preparlaboroj, al la urbaj kaj landaj instancoj, precipe al la urbestro, pro la komplezo al tiu ĉi manifestacio por la popola interkompreno. Antaŭ la inaŭguro okazis katolika Diservo. Ĝi estis la unua esperantlingva meso en la mondo laŭ la nova, dum la Roma koncilio fiksita rito. Posttagmeze okazis ekskursoj, kaj vespere la partoprenantoj povis ĝui aŭstran popolan kantadon, dancadon kaj muzikon. Dum kvar tagoj la Linz-anoj havis okazon informi sin pri Esperanto en riĉenhava ekspozicio.

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Mihail Lermontov, la granda majstro de la rusa prozo, UEA eldonis ĉi tiujn elstarajn rakontojn en la traduko de D. Staritsky.

Kun bibliografio de Lermontovaj verkoj en Esperanto

Moderna plasta kovrilo

Prezo: 5,— gld.
(20 steloj)



Per plumo samtempe ekscita, kortuŝa, ironia kaj senspirige poezia, la aŭtoro vojaĝigas nin kun juna rusa oficiro, laca pri la vivo kaj kroĉiganta al la iluzia feliĉo de fortaj sensaĵoj.



UZU LA JIK-GLUMARKOJN

Prezo: 0,40 gld.
(1rp.) por unu folio (10 markoj)

**KAJ
VARBU
SUBSKRIBOJN !**

NUN AĈETEBLA !

**kompleta kolekto de la revuo
MONDA KULTURO**

de 1962 ĝis 1964, kune bindita en unu bele vestita volumo, kun ora surpriso kaj detala indekso laŭ temoj kaj aŭtoroj. Daŭre valora!

Nur 19,— gld.
76,— steloj

Eldonaĵoj por Geknaboj

Serio de broŝuroj por infanoj
kiuj lernas Esperanton

LEGU kaj LERNU

24 p. 11 x 17 cm. karton-kovriloj
'absorbos la intereson de la infanoj
kaj stimulos ilian volon kaj scion
fariĝi veraj zamenhofanoj.' — 'Paco'
Ses titoloj aperas dum la jaro.

Ĉiu broŝuro enhavas kantojn, ludojn,
kaj legaĵojn. Jam aperis:

1. 'El Afriko': 2. 'Idetoj':
3. 'Vortludoj': 4. 'Sub la Ĉielo'.

La tutmonde konata popolkanto 'La
Gaja Vaganto' troviĝas en 'Sub la
Ĉielo'.

Po 3 steloj (lŝ.6p.)

Abonantoj al la tutjara serio ricevas bultenon
kun ĉiu numero. Jarabono: 21 steloj (10ŝ.6p.).

DU EKZERCAROJ

'Kion vi faras?' kaj 'Kion vi diras?'

28p. 11 x 17 cm. karton-kovriloj.

Po 4 steloj (2ŝ.)

Mendu aŭ abonu ĉe U.E.A. aŭ rekte ĉe
D. Faux, 4 Brunswick-sq., Gloucester, Ang-
lujo.

ĴUS APERIS!

"TIAJ NI ESTAS"

Broŝurita, 250-paĝa libro, (verko lingve
reviziita kaj rekomendita de Aŭstria
Esperanto-Instituto), enhavanta 34 ra-
kontojn kaj 32 ilustraĵojn. La kvarko-
loran titolpaĝon pentris fama sveda
karikaturisto, s-ro Högfeldt.

Aĉetebla ankaŭ en anglalingva eldono,
markita:

*Translated from Esperanto the Inter-
national Language* kaj havanta titolon:
"Behold You and Me." (Bona propa-
gandilo por nia lingvo kaj movado.)

Mendu la librojn ĉe UEA, ĉe via nacia Es-
peranto-Asocio, aŭ rekte ĉe la aŭtoro:

Sandor J. Bako

866 So. Norton Ave.

Los Angeles, California 90005, USONO

Prezo: 2.00 dolaroj + 10 % sendkostoj

Ĵus represita !

La ĉie ŝatata rektametoda lernolibro

PRIVILEGIA VOJO

al lingvoscio: Esperanto

Jam 16 500 ekzempleroj presitaj de la
internacia kaj naciaj eldonoj ! Bone
uzebla tiel por kursoj kiel por mem-
lernantoj. Instruas ĉiujn novajn vor-
tojn per simboloj, ilustraĵoj aŭ per
jam lernitaj vortoj; kontinua teksto.

Liverata kun instrukcioj en A, Da, F, G, H,
Ne, No k.a. lingvoj laŭ elekto de la mendanto.
Prezo: 13 steloj (3,25 gld.) plus afranko. Sola
vendrajto ekster Skandinavio: UEA.

LERNOLIBRO POR LA TUTA MONDO

Eldono de KOSMO Traduko de T. Nakamura


Okakura kakuzo

LA LIBRO DE TEO

Studolibro pri orientaj ideoj kaj idealoj

142 p.
luksa
prezento

\$ 2,50
9,— gld.
36 st.



"Kiam venis Enciklopedieto Japana, mi estis
konvinkita, ke tiu libro estas apenaŭ super-
ebla. Sed jen La Libro de Teo ĝin superatutis!"

Juan Régulo-Pérez


Sola vendrajto ekster Japanujo: UEA

Por mi la nomo signifas Kvalito !


PASINTAN KRISTNASKON MIA EDZINO donacis al mi **PHILISHAVE** (kia bonŝanco!). Onidire mi jam aŭdis ke ĝi estas bona razilo, sed nun mi scias proprasparte ke ĝi elstaras: efika, fidinda kaj... ĝi plene valoras sian prezon.



DEZIRANTE RECIPROKI, mi decidis regale surprizi mian edzinon per fridujo de Philips. Kiom ravita ŝi estis, kaj nun ŝi demandas sin kiel ŝi povis vivi sen ĝi. Ke mia biero restas malvarmeta, ĝuste je mia preferata temperaturo, estas nur pure koincida krom-rezulto.



LA PHILIPS-EMBLEMO ne estas nova por mi - En mia laborejo ĝi aperas sur ĉiaspecaj super-progresaj elektronaj ekipaĵoj. Mia kompanio utiligas nukleo-instrumentojn kaj sciencajn aparatojn de Philips. Oni ĵus instalas perkablan televidan sistemon de Philips.



fido al **PHILIPS** estas tutmonda

Okupante preskaŭ 250.000 kunlaborantojn, Philips estas unu el la plej grandaj elektronaj industrioj de la mondo. Propraj naciaj organizoj en 55 landoj, agentoj en 115 merkatoj.

LUMO, SONO, RADIO, TELEVIDO, MASTRUMAJ APARATOJ, GRAMOFONDISKOJ, TELEKOMUNIKADO, KEMIAJ KAJ FARMACIAJ PRODUKTAĴOJ, MEDICINAJ, INDUSTRIAJ KAJ SCIENCAJ APARATOJ KAJ ELEKTRONAJ KONSTRUPARTOJ.

